

KONSOLANTO

Organo de Spiritisma Esperanto-Asocio (SEA) | Jaro 3 | N-ro 3 | Septembro 2023

“

Ek al la laboro!
La plugilo estas preta;
la tero atendas...

El la verko *La evangelio laŭ spiritismo*,
de Allan Kardec.

SEA
BAES estas
alinomita

RECENZO
Kinofilmo pri
Zé Arigó

LITERATURO
“Noticoj”, traduko de
teksto de Abel Gomes

KONSOLANTO

3a jaro | n-ro 3 | Septembro 2023

Organo de Spiritisma Esperanto-Asocio (SEA), fondita en 2008.

Senpaga bitversio 1.0 | Presitaj ekzempleroj haveblas laŭmende.

Redaktis kaj enpaĝigis Leandro Abrahão | **Asistis** Ana Paula Pose, Josenilton Nascimento kaj Paulo Pires | **Konsilis** Fábio Fortes, Lívia Araújo, Paulo Sergio Viana kaj Rodrigo Scalia. **Kunlaboris** Affonso Soares, Belmiro Alves, Elaine Kapp, Geraldo Campetti, Givanildo Costa, Gustavo Magalhães, Jader Rodrigues da Silva, João José Santos, Joel do Ó kaj Paulo Sergio Viana. | **Provlegis tute aŭ parte** Espoir Kasati, João José Santos, Josenilton Nascimento kaj Jader Rodrigues da Silva.

Pri la subskribitaj artikoloj respondas la aŭtoroj mem.

Niaj konstantaj esplorfontoj

Speciala danko al Biblioteko Carlos Domingues (Brazilo), Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj (Aŭstrio), www.bitarkivo.org kaj Brazila Spiritisma Federacio, kiu disponigas elektronike ĉiujn numerojn de sia organo, nome Reformador.

ESTRARO DE SEA (2021-2024)

Prezidanto: Leandro Tomé Abrahão

Vicprezidanto: Sandro Moreira Alves

Sekretario: Harison Gomes de Alencar

Kasisto: Rodrigo de Carvalho Mendonça

📖 QR 517 Conjunto M, casa 12, Santa Maria, 72547-813, Braziljo, Brazilo.

🌐 www.konsolanto.org

✉ saluton@konsolanto.org

☎ +55 34 997748785



Kovrilo: Bildo ellaborita de la *artefarita intelekto* de Adobe Photoshop. La frazo estas elprenita el la verko *La evangelio laŭ spiritismo*, ĉapitro 20.

ENHAVO

- 05 Salute**
BAES estas alinomita
- 06 Leterkesto**
- 12 Recenzo**
Kinofilmo *Antaŭdestinito* (+ intervjuo kun la reĝisoro)
- 23 Ekster la rondo**
Malhonesta mediumo (anekdoto el la libro *Faktoj kaj fantazioj*)
- 31 Raportoj**
13a BRES
Frateco sen Limoj: karavano al Madagaskaro
Nia revuo en Kanado
10a Monda Spiritisma Kongreso
Frata Espero
Vizito al spiritisma organizaĵo en Francio
- 53 Literaturo**
Noticoj (traduko)
- 66 Felietono**
Kelkaj personaj okazintaĵoj (el la verko *Kunlaborada verketaro*)



- 70** **Eventoj**
10a Tutamerika Kongreso de Esperanto
14a Spiritisma Esperanto-Renkontiĝo (SER)
4a Monda CONCAFRAS
- 72** **Anoncoj**
50-jariĝo de Bahaa Esperanto-Ligo (BEL)
Legio de Bona Volo lanĉas novan infanlibron en Esperanto
La libro de la spiritoj nun en aparta retejo
Nova eldono de la vortaro Allan Kardec Afonso Costa
Eldonejo Lorenz havas novan, propran sidejon
- 78** **Asocia angulo**
Statistiko de Kampanjo Abel Gomes
Blogo de SEA unujariĝis
Nova fonduso por financado de la asocia agado
- 82** **Forpasoj**
Francisco Mattos de Oliveira
Giuseppe Grattapaglia
Neide Barros Rêgo
José Passini
Maria Garcia Borges
Paulo Roberto de Freitas Carvalho
- 84** **Korektoj kaj precizigoj**
- 87** **Evangeliaj plukoj**
Nur tiel

SALUTE

BAES estas alinomita, ankaŭ nia revuo, niaj retpaĝaro kaj retpoŝtadreso. Novaj ebloj kaj perspektivoj.

La unuan fojon la revuo havas nebrazilajn kontribuintojn. João José Santos, el Portugalio, tradukis. Espoir Kasati, el Kongolando, provlegis. Korespondado kun nia duobla samideano Przemek, el Pollando, rezultigis tutnovan eseeton pri la sano de la patrino de Eurípedes Barsanulfo.

Nia revuo akiris ISSN-numeron (2764-7927). Ĝi aperus jam nun se ne estus la ŝanĝo de la nomo de la revuo. Necesas akiri novan, ekde la dua numero kun la nova nomo. Nu, en 2025 ni denove havos ĝin.

Redaktaj konvencioj de la revuo komencas konturiĝi. Ni preferis ne postuli de la aŭtoroj alprenon de iuj formoj. Kun la tempo

kaj diskoniĝado de redaktoprincipoj, la tekstoj fariĝos almenaŭ terminologie pli kaj pli unuecaj.

Cetere, terminologio estas temo, kiu delonge okupas nin. Tuj kiam finpretiĝos materialo pri la temo, ni aperigos ĝin en la revuo.

Sur paĝo 88 vi trovos novan, nekonstantan rubrikon. En la lasta numero de la revuo, ni trovis malfirmajn punktojn, kiujn ni nun korektas kaj precizigas. Komentoj pri tajperaroj estas ellasitaj. Ni konscias, ke misetoj enŝteliĝis ie kaj ie, eĉ plej evidenta gramatika stumblo estas. Al ni restas pardonpeti al vi. Plene respondas pri ili la redakcio, ne la provlegintoj.

La enhavo de la nuna numero estas aparte ampleksa kaj riĉa.

Al vi ni deziras tre agrablan legadon! 📖

NIAJ LEGANTOJ

Por konigi vian opinion, sufiĉas retleteri al nia redakcio.
Ni antaŭĝojas la kontakton!

“

Spiritismo estas tutmonda fenomeno. Esperanto estas tutmonda lingvo. Ni do aplaŭde bonvenigu la novajn titolon kaj ampleksojn de la asocio kaj de ĝia revuo: Spiritisma Esperanto-Asocio kaj Konsolanto. Longan vivon al ili!

Paulo Sergio Viana,
Brazilo, per Vacapo.

“

Montriĝas bonvena, trafa kaj precipe laŭcela la elekto de nova nomo por la iam nomita Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj (BAES).

Laŭcela, ĉar la nova nomo – Spiritisma Esperanto-Asocio (SEA) – konformas al la intenco de la nuna Estraro ampleksigi la atingopovon de la Institucio, ĝin etendante al la eksterlanda esperantistaro, kion iel nebligis ĝia nacia karaktero. (...).

Kun deziresprimo por senĉese sukcesa tutmonda semado de la Idealoj de Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto, ni kore gratulas ĉiujn aktivulojn de SEA.

Affonso Soares,
Brazilo, per Vacapo.



Saluton! Mi estas Waldemar el Pollando, mi nuntempe lernas Esperanton kaj mi ŝatas spiritismon. Mi ne estas spiritisto, sed spiritismo estas tre bona. Mi legis vian gazeton; bona gazeto. Mi scias ke BAES estas por spiritistoj el Brazilo, sed mi scias ke en Pollando estas spiritisma asocio, ne-granda, sed aktiva. Mi pensis, ĉu vi povas kontakti ilin? (...).

Mi ŝatis vian materialon. Mi scias ke en la pola estas libroj kiel *La libro de la spiritoj* aŭ *La evangelio laŭ spiritismo*, mi neniam vidis kaj scias ke ĉi tio estas disponebla en Esperanto. Mi rimarkis tion nur post kiam mi vidis la fotojn en via Gazeto. Mi ĉiam volis scii kiel spiritismo estas en Brazilo, bedaŭrinde mi ne scias la portugalan, sed nun per uzo de Esperanto mi povas vidi kiel via komunumo estas :)

Bonan tagon al ĉiuj membroj de BAES!

Waldemar Napora,
Pollando, per retroŝto.



Ni reagis al Waldemar, dankis lian kontakton kaj aperigas lian komenton kun lia permeso. Pri la spiritisma asocio menciita de li: verŝajne temas pri organizaĵo prezidata de Konrad Jerzak, en Varsovio. Ni ankoraŭ ne kontaktis lin, sed faros. Rilate librojn: danke al la stoko de Kampanjo Abel Gomes, SEA poŝte sendis al Waldemar kelkajn verkojn en Esperanto. Laste, pri lia komento, ke “BAES estas por spiritistoj el Brazilo”. Nu, ne plu!

“

La “Gazeto” estas mirinda. Mi tralegis la tutan. Mi gratulas al vi ne nur pro la bonega teknika formo, sed ankaŭ sciencecaj artikoloj, kiuj bonege prezentas la originon de spiritisma-esperantista kunlaborado. Ankaŭ la artikolo pri d-ro Barsanulfo kortuŝis min. Do, ankoraŭfoje dankegon kaj gratulon! Dio benu vin ĉiujn.

Przemek Grzybowski, Pollando,
per Facebook Messenger.



Doktoro pri pedagogio, instruisto ĉe Universitato Kazimierz Wielki en Bydgoszcz, Pollando, kaj aŭtoro de plurspecaj verkoj. Li interesiĝas pri interkultura kaj kompara pedagogioj. Tradukis en la polan *La libron de la spiritoj* (du eldonoj), *La libron de la medioj* (du eldonoj) kaj *La ĉielon kaj la inferon* (unu eldono). Laŭ informo de Przemek, la eldonisto estas Wydawnictwo KOS, en Katowice, Pollando ĉe kiu prepariĝas nun la tria eldono de la *Libro de la spiritoj* (la du unuaj elĉerpiĝis).

Kurioze Przemek en sia komento nomis Eurípedes *doktoro*. Kvankam Eurípedes ne akiris kuracistan diplomon, li plurmaniere flegadis kaj resanigadis personojn. Efektive li deziris fariĝi kuracisto, aparte pro la sanstato de sia patrino, s-ino Meca.

Laŭ la biografio de Eurípedes, verkita de Corina Novelino, la patrino de Eurípedes suferis dum tridek jaroj pro “insidaj krizoj” ekde la naskiĝo de la unua infano, nome Maria Neomísia. Dum la mesoj en la katolika preĝejo, s-ino Meca havis viziojn, kiuj svenigis ŝin.

Corina ne faras diagnozon de ŝia kondiĉo, sed prezentas la efikojn de la “oftaj atakoj”, kiuj ek-kaptis ŝin, kiu – laŭ Corina – estis “gaja, vigla, komunikema” en senkrizaj periodoj.

Komence de 1902, Eurípedes kaj lia patro, s-ro Mogico, vojaĝis el Sacramento al Rio-de-Ĵaneiro, tiama ĉefurbo de Brazilo, kun la duobla celo ebligi al Eurípedes daŭrigi siajn studojn kaj trovi laboron. Post 20 tagoj ili reiris hejmen, pro la necesaj disponoj antaŭ la definitiva transloĝiĝo de Eurípedes al Rio-de-Ĵaneiro – la 21-jara junulo sukcesis matriculiĝi je la preparkurso por la medicina fakultato.

Antaŭ la forveturo de la filo, kiam s-ino Meca estis pakanta lian “modestan valizon”, krizo atakis ŝin. Laŭ

Corina, tion kaŭzis “malĝojo pro la baldaŭa disiĝo”. S-ino Meca “estis ĉiam tre sentema kaj ne rezistis ian ajn emocian ŝokon”. Kiam ŝi rericevis la konscion, ŝi konstatis, ke la valizo de Eurípedes estas malpakita, kaj la filo “neniam plu tuŝis la temon”.

Iam Eurípedes diris al la patrino: “Mi ne ripozos, ĝis mi kuracos vin.” La kuracado de s-ino Meca konsumadis la familiajn enspezojn kaj konstante zorgigis la edzon, s-ron Mogico. Malgraŭ tio, plena resaniĝo okazis nur pli malfrue. Laŭ Corina, la krizoj okazis pro la agado de spirito, kiu ŝin turmentis dum tiuj tri jardekoj da suferado por la tuta familio. Orientite de Eurípedes, kaj ne plu povinte influi s-inon Meca, kiu “akiradis valoran internan rezistopovon danke al la kunlaboro kun la filo je la kuracado de malsanuloj”, la “malfeliĉa frato” retiriĝis, finfine venkita de la “lumo de amo”.

*

Nu, la forigo de ia ekstera kaŭzo povas ŝajni simplisma solvo, eĉ mirakla, se oni konsideras la daŭron kaj intensecon de la malsano kaj la fakton, ke la kazo de s-ino Meca sugestas konvulsiojn probable kaŭzitajn de epilepsio¹.

En la verko *Nos domínios da mediunidade (En la regno de mediumeco)*, Andreo Ludoviko, la



Jerônima Pereira de Almeida (1859-1952), s-ino “Meca”,
patrino de Eurípedes, en la aĝo de 75 jaroj.

spirita aŭtoro, prezentas similan kazon. Esploro kaj lernocele, Andreo, akompanate de spiritaĵgvidantoj, priskribas la staton de Petro – malsana viro, kiun zorgis la patrino. Petro aspektis afliktita, kaj paroletadis balbute, nekompreneble por Andreo.

Ekstere troviĝis spirito, kiu eniris nur post permeso de la gvidanto Clementino. La gardistoj allasis la elkarnulon, kiu “trairis subite la detenajn vibroliniojn kolerkriante, ekscitegita: “Petro! Petro!...” Ĉe la alproksimiĝo de tiu spirito, Petro “akute ekkrias kaj ekfalas”. La “persekutanto” flame kriadis: “Mi venĝos min! mi venĝos min!...” Laŭ Andreo, elkarnulo kaj enkarnulo “ŝajnis unuiĝintaj”, la cerba kortek-


so prezentiĝis volvita de “malhela fluideca maso”, kaj li konkludas, ke epilepsia konvulsio montriĝas laŭ sia “klasika simptomaro”.

Epilepsio estas malsano konata “de antikvaj eraoj”². Inter la dokumentitaj kaŭzoj troveblas la t.n. *morbus demoniacus*, pro la supozo pri posedo fare de “demonaj estuloj”. Ne hazarde la ĉapitro pri la kazo de Petro nomiĝas “Posedo”. La aŭtoro Jorge Andréa aldonas, ke la efikoj iafoje manifestiĝas “ankaŭ post la malapero de la negativa spirita influo”, kaj ke estas “formoj de epilepsio” kaŭzataj ekzemple de “krania traŭmato”, do sen ia ligo kun la agado de elkarniĝinta estulo.

Ni demandis al Przemek, ĉu li nomis Eurípedes *doktoro*, ĉar li iel sciis pri lia iama deziro fariĝi kuracisto, kaj li respondis:

“

Mi ĉiam estis certa, ke Eurípedes Barsanulfo estis doktoro/kuracisto. Evidente mi ekaŭdis pri li nur dum mia restado en Brazilo. Ekde tiam liaj biografio kaj agado ĉiam interesis min, do mi esploretis pri tio en Interreto kaj libroj. Li ŝajnas al mi elstara instruisto, edukisto kaj (fine, kial ne!) kuracisto, ĉar oni kuracas ne nur per medikamentoj, sed ankaŭ per amo, laboro kaj sindediĉo. Do, por mi, li restos la doktoro Barsanulfo. ■



Lia biografio

Eurípedes: la homo kaj la misio
(Ankoraŭ ne tradukita en Esperanton)

1. La “krizojn” povus kaŭzi ankaŭ *disocia malordo* (laŭ KIM-11: 6B6Z).
2. Manoel Philomeno de Miranda (spirita aŭtoro), *Trilhas da libertação (Vojoj al liberiĝo)*, medume verkita de Divaldo P. Franco, FEB.
3. Jorge Andréa dos Santos, *Visão espírita nas distonias mentais (Spiritisma vidpunkto pri la mensaj perturboj)*, FEB.

RECENZO

Paulo Sergio Viana | psviana@terra.com.br

ANTAŬDESTINITO

Arigó kaj la spirito D-ro Fritz

Lanĉo: La 1an de septembro 2022, Brazilo

Daŭro: 1h49


Ĝenro: Biografio

Reĝisoro: Gustavo Fernández

Rakonto: Jaqueline Vargas

Trupo: Danton Mello, Juliana Paes kaj Marcos Caruso

Originala Titolo: *Predestinado: Arigó e o espírito do Dr. Fritz*



En la fina parto de la filmo *Antaŭdestinito: Arigó kaj la spirito D-ro Fritz*, oni povas vidi interesan, pensigan sinsekvon de scenoj, kiuj alternas: jen aŭtomobilo, stirata de la protagonisto, veturas al fatalo, jen lia edzino hejme laboras per kudromaŝino en febra maniero. Ŝiaj piedoj ritme movas la pedalon de la maŝino, dum la kudrilo vige traboras la tolaĵon. Jen simpla sed trafa metaforo pri la homa vivo: kio estas vere, esence grava? Ni plenumu niajn devojn digne, sentime, fidante Dion, kiu gardas nin preter ia ajn fatalo. En alia sceno de la filmo, la famekonata mediumo Chico Xavier komentas: “Ne afliktiĝu! Ĉi tiu vivo estas nur pasado...”

La filmo, lanĉita en la jaro 2022, dece plenumas sian intencan. Se ĝi ne konsistigas majstroverkon de la kinarto, tamen ĝi fluas per bona tekniko, bona aktorado, bona prilumado kaj precipe en sufiĉe bona ritmo. Nepeza, agrabla filmo, por ordinara spektanto, kiu ne okupiĝas pri kritikado al la Spiritisma Doktrino; tre agrabla por tiuj, kiuj jam alprenis la instruojn de tiu Doktrino; eble kritikebla, fare de homoj, kiuj spektus la filmon por kontesti la mediumajn fenome-

nojn. La filmo certe ne povas konvinki obstinajn neantojn.

Ĝi rerakontas realan okazaĵon. La fenomeno “Zé Arigó” skuis la brazilan popolon per sia eksterordinareco. En la mezo de la 20a jarcento, ĝi mobilizis la tutan publikan opinion, de plej simplaj homoj ĝis aŭtoritatuloj kaj sciencistoj. La Spirito D-ro Fritz, pere de simplulo en la interno de la brazila ŝtato Minas Gerais, meze de tre konservema loĝantaro, en tradicimora urbo Congonhas (fama pro la statuoj de profetoj en majesta katolika sanktejo), okazigis operaciojn sen anestezo, en spiritisma domo, kaj resanigis milojn da personoj. Fakte, li akceptis entute du milionojn da homoj, laŭ informoj. Oni ne forgesu la gravan apogon, kiun al li donis lia edzino Arlete, dum lia agado kiel mediumo. Arigó estis procesita kaj kondamnita al enprizoniĝo pro “neleĝa praktikado de medicino”, sed neniu el liaj “pacientoj” ricevis lezojn, kiuj povus karakterizi krimon. Sciencistoj alvenis por ekzameni lin kaj la fenomenojn. Estis neeble aserti, ke temas simple pri trompo aŭ iluziumado.

La filmo perfekte montras la krudan manieron, kiel D-ro Fritz agis: per ordinaraĵaj hejmaj tran-



FOTO DE LA INTERVJUO DERIE (P. 46)

Danton Mello, en la rolo de Arigó, dum akceptado de malsanuloj (sceno el la filmo).

ĉiloj, kiujn li purigis per la ĉemizo de la mediumo. Klingojn li terure metis sub la palpebrojn de okulmalsanuloj, por la koncernaj operacioj. (Nuntempe, spiritaj operacioj prefere okazas per la forto de “energio-fluidaĵoj”, do sen sango, sen materiaj tranĉoj, por eviti tiujn ŝokajn scenojn montratajn en la filmo.) Laŭ informoj, tiu Spirito elkarniĝis okaze de la Unua Mondmilito kaj ricevis la mision realigi multenombrajn spiritajn operaciojn.


Rilate al la mediumo Zé (“Joĉjo”) Arigó, la Spirito devis venki sufiĉe da rezistemo, ĉar li estis katoliko kaj komence tute ne komprenis, ke li devos funkcii kiel “perilo” de D-ro Fritz, por la

okazigo de la koncernaj kuracoj. Kompreneble, ankaŭ la loka katolika pastro konsideris lin sorĉisto kaj klopodis demovi lin de tia agado. Tamen, la mediumo konservis sin honesta, nenian pagon ricevis pro sia laboro kiel mediumo, kaj daŭre kondukis kiel vera bonkora kristano. La vorto “arigó”, en la brazilportugala lingvo, signifas “simplulo, simplanima homo”, kaj perfekte taŭgis kiel lia kromnomo.

Ĉiujn tiujn detalojn la filmo flue montras, klare kaj nature. Ĝi sukcesas lerte transdoni la tutan rakonton, sufiĉe fidele, se oni komparas ĝin kun la registraĵoj efektive faritaj en la tempo, kiam vivis kaj agis la mediumo.

Grava estas la serioza uzado de kinaro por diskonigo de la mediumaj fenomenoj. Estas fakte mirinde, ke en nia mondo ankoraŭ tiom multe da personoj neas aŭ simple ne interesiĝas pri ili. Tiaj fenomenoj ja povas esti efika enirpordo al konvinkigo pri la spirita mondo, pri nia destino sur la Tero, pri nia devo antaŭ Dio. La Spiritisma Doktrino ja

instruas, ke paralele al eksterordinaraj mediumaj fenomenoj, kiel tiuj montrataj en la filmo, ĉiutagaj diskretaj manifestiĝoj de mediumeco okazas en la vivo de ni ĉiuj – kaj konsciigo pri tio povas modifi nian taksadon pri nia propra ekzistado. Valoras do la penon spekti kaj pripensi ĉi tiun atentovekan, kompetente kaj honeste faritan filmon. ■



José Pedro de Freitas, "Joçjo Arigó"
(1921-1971)

Naskiĝis en la brazila urbo Congonhas. Oni taksas, ke lia agado bonfaris al ĉirkaŭ du milionoj da homoj, el kiuj multaj venis el aliaj landoj por esti resanigataj de li. Ĉion li faris senpage.

INTERVJUO

La brazila periodaĵo *Revista Internacional de Espiritismo* – RIE (*Revuo internacia pri spiritismo*) publikigis en la aŭgusta numero de la jaro 2022 intervjuon kun Gustavo Fernández, reĝisoro de la filmo “Arigó”. Nun, kun permeso de la RIE-redakcio, nia revuo aperigas ĝin en Esperanto.



TV GLOBO

Gustavo Fernández, reĝisoro de la filmo *Antaŭdestinito* – *Arigó kaj la spirito D-ro Fritz* (pt: *Predestinado – Arigó e o espírito do Dr. Fritz*), parolas pri la produktado, pri la trupo-elekto kaj pri tio, kion oni povas esperi el ĉi tiu filmo je spiritisma temaro.

Ĝia debuto okazis tra Brazilo en la 1a de septembro 2022. Ĝi estas nova spiritisma filmo, kies steloj estas Danton Mello kaj Juliana Paes.

La roloj de la medio Arigó kaj lia edzino Arlete alportas fortajn emociojn al la spektantoj. Tion asertas la reĝisoro Gustavo

Fernández, kiu jam laboris en grandaj sukcesoj de la brazila televido, kiel la telenoveloj *A favorita*, *Avenida Brasil*, *Velho Chico* kaj nuntempe *Pantanal*. Unue, oni antaŭvidis la debuton de ĉi tiu filmo por junio 2020, sed pro la pandemio Kovim-19, la debuto malfruiĝis. Gustavo kredas, ke

Antaŭdestinito alvenas al la publiko en la ĝusta momento, kiam la homoj pli bezonas pozitivan mesaĝon de kareso, de amo, por turni la okulojn al la proksimulo. Kun elstara filmotrupo kaj altgrada kina kvalito, la filmo montras

la internajn luktojn kaj eĉ la rifuzon de José Pedro de Freitas (1921-1971) por akcepti sian mediuman mision. Konita kiel Arigó, li estis simpla viro el la subŝtato Minas Gerais.

Arigó, kia fascina homo!

Intervjuis Cássio Leonardo Carrara | cassio@oclarim.com.br
El la portugala tradukis João José Santos | lakaravelo@gmail.com

RIE: *Kial alporti la vivon de José Arigó al la kinejoj? Kiel aperis la motivado por ĉi tiu filmo?*

Gustavo: Antaŭ kelka tempo, Roberto d'Ávila, la posedanto de Moonshot, la produktentrepreno de ĉi tiu filmo, klopodis ebligi la projekton de *Antaŭdestinito*, kiu rakontas la vivon de Arigó. Mi estas reĝisoro de *TV Globo* de antaŭ 20 jaroj, kaj Roberto ĉeestis en laboro direktita de mi, kiu estis la ĝenerala reĝisoro. Li tion ŝatis, kaj min invitis por estri ĉi tiun filmon. Tiel mi ekenvolviĝis en ĉi tiun projekton, kaj tuj mi komprenis tion, kio motivis lin: la precipa rolulo de la filmo, kio estas evidenta, ĉar Arigó estis fascina homo, kun nekredbla

vivrakonto, pro liaj kvalitoj, pro la tempo en kiu li tiel reliefe laboris kiel mediano. En lia epoko, Arigó estis unu el la plej famaj homoj en Brazilo, kiel Roberto Carlos, Pelé kaj Silvio Santos. Homoj karavanis por viziti lin, en ekskursoj el la tuta lando kaj eĉ el aliaj landoj. Eĉ ekzistis tiam buslinio, kiu ligis Buenos Aires al Congonhas do Campo [nuntempe Congonhas], la urbo kie li vivis kaj laboris. Verdire, mi eĉ demandas min mem, kial oni ne atentis lian historion pli frue, ĉar ĝi estas vere fascina, vere adekvata por turniĝi en filmon.

RIE: *Kiel vi pritraktis la mediuman evolviĝon de Arigó kaj, poste, la spiritalajn kirurgiojn fare de D-ro Fritz?*

Gustavo: En ĉiuj aspektoj de la filmo, mi, la produktisto Roberto d'Ávila kaj la rakontistino Jaqueline Vargas, ĉiam strebis alporti version kun respekto kaj kun vero, ne falinte en simplan apologion. La mediumeco de Arigó evidentigas aspektojn tre interesajn. Dum la infaneco, lia mediumeco lin turmentis. Poste, en la adolta vivo, oni ekzamenis lin, ĉar li aŭdis voĉojn, havis viziojn, kaj li mem multe batalis kontraŭ tio. Dum longa tempo, Arigó ne akceptis sian mediumecon, ĉar tio postulus de li vivoŝanĝon, devon, kiu povas timigi iun ajn. Pri la famaj spiritaj kirurgioj faritaj pere de li kiel mediumo, uzante neadekvatajn hejmajn ilojn, kiaj estas kuirejaj tranĉiloj, ni serĉis referencojn en multaj materialoj registritaj en la epoko. Ekzemple, NASA-komisiono, kiu studis parapsikologion, aliris al Arigó por sekvi la fenomenon, kiu envolvis lin, kaj faris diversajn filmadojn pri la kirurgioj. Ni multe uzis tiujn atestojn por nia versio, kaj ĉiam alfrontis intiman dilemon: la limon kien ni rajtis iri, ĉar kelkaj scenoj povas esti tre ŝokaj. En kelkaj kirurgioj, li uzas tranĉilon en la okulon de la homo. Ni devis montri la situaciojn, sed laŭ kontrola maniero, por ne ŝoki eĉ pli. Resume, nia maniero aliri al la faktoj estas ekvilibra versio, kiu respektas la veron.

RIE: *Kaj kio pri la rilato de José Arigó kun Chico Xavier?*

Gustavo: La filmo enhavas belegan scenon, en tre bela loko, kie ili renkontiĝas. Mi speciale ŝatas tiun scenon. Estas nekredeble havi la eblecon montri la renkontiĝon inter tiuj du grandaj figuroj, tiuj du gigantoj de la brazila spiritista universo. Kiam Arigó ankoraŭ estis vidata rezerviĝeme de kelkaj grupoj, Chico Xavier kvaŝaŭ koncedis avalon al li. Se tio okazis ĝuste kiel ni montras, certe Arigó tre komfortiĝis.

RIE: *Kiuj aspektoj de la personeco de Arigó pli atentigas vin?*

Gustavo: Kiam oni invitis min estri la filmon, mi tuj havis intencion, kiu jam ekzistis en la projekto de Roberto: rigardi la viron Arigó, tiun simplan viron, kiu ricevis gigantan spiritodonacon, sed ankaŭ la pezan responson kaj la pezan dediĉon. Tio ŝtelis de li la propran tempon, kaj la familian, por plenumi mision, kiu venas kune kun tia spiritodonaco. Tiom multe li rezistis ĝis kiam li finfine akceptis tiun mediumecon! Tiel, li sin transformis en personecon konatan en la tuta mondo, kaj tio generis ne antaŭvideblajn admirantojn. Ekzemple, la aktoro, kiu havas la rolon de D-ro Fritz, estas anglo



FOTO ELLA INTERVJUO DE RIE

Danton Mello, en la rolo de Arigó (sceno el la filmo).

nomita James Faulkner, kiu laboris en grandaj filmproduktaĵoj, kiel ekzemple *Game of Thrones*, kaj li antaŭnelonge protagonistis filmon nomiĝantan *Paulo, apóstolo de Cristo* [*Paŭlo, apostolo de Kristo*], tio estas, li estas internacia aktoro. Li montriĝis interesata partopreni en nia filmo, ĉar li jam estis leginta la historion de Arigó. Tio estas eksterordinara! Tiu simpla homo el Minas Gerais havis tian povon alvenigi eĉ gravajn homojn.

RIE: *Danton Mello kaj Juliana Paes estas en la precipaj roloj. Komentu pri ilia integrado en la rakonton, kaj kiel oni elektis la filmotrupon.*

Gustavo: Danton kaj Juliana estis du grandaj konkerroj por la rakonto. Ili sin tute dediĉis al la filmo, al siaj rolpersonoj. Fakte ilia laboro estis belega. Danton havas nekredblan roladon, kaj Juliana montras alian aktorinan flankon tre malsaman de tiu, por kiu oni ĝenerale vokas ŝin. Pri la ceteraj aktoroj, ekzistis kelkaj etaj partoprenoj. Tamen ili rilatas al personoj, kiuj estis preskaŭ ikonaj, ĉar ili estis gravaj figuroj de la diversaj epokoj de la vivo de Arigó. Ili devis havi reliefan ĉeeston. Por tiuj rolpersonoj, ni volis voki tre konatajn aktorojn. Alexandre Borges rolas kiel la deputito, kiu estis la unua



FOTO EL LA INTERVJUO DE RIE

Aktoraro.

paciento de spirita kirurgio, de Arigó kaj Fritz. Marcos Caruso rolas kiel la pastro de Congonhas, kiu reprezentas la persekuton, kiu estis suferita de Arigó far la eminentuloj de la katolika religio. Marco Ricca rolas kiel la juĝisto, kiu lin kondamnis, en jura persekuto, suferita de Arigó. Cássio Gabus Mendes rolas kiel la ĉefpolicano de la arestejo, kie li restis post la kondamno. En la aliaj multenombraj partoprenoj, kiel la laborkolegoj de Arigó, familianoj, pacientoj, personoj kiuj pasas en la rakonto, ni strebis uzi precipe aktorojn el Minas Gerais, por ekhavi, tiom kiom eble, spicon de la regiono.

RIE: *En la komenco, oni antaŭvidis la filman debuton por la jaro 2020, sed ĝi estis prokrastata pro la pandemio. Kiel vi vidas tiun situacion? Ĉu okazis iu bonaĵo aŭ damaĝo pro tiu prokrasto?*

Gustavo: La pandemio surprizis nin kaj malpermesis la filmolanĉon, sed mi eĉ ne pensas, ĉu tio estis bona aŭ damaĝa. Okazis tiom da gravaj konsekvencoj, sed mi estus frivola, se mi dirus, ke la pandemio damaĝis la filmon. Se oni pensas serioze, la filmo alvenas en bona momento, en kiu la homoj bezonas pozitivan mesaĝon, de kareso kaj amo. La fil-

mo tion havas. Estus absurde diri, ke la pandemio estis favora, sed la filmo trovis sian momenton por sia lanĉo.

RIE: *Precipe en la lasta jardeko, oni konstatas grandan avancon de la filmproduktaĵoj kun spiritisma temaro. Kion vi pensas pri tia filmoĝenro kaj pri la publika intereso?*

Gustavo: Ĝi estas tre grava ĝenro, kiu jam generis grandajn filmojn, kiuj estis mone profitigaj por la brazila kinindustrio en la jaroj de la debutado. Krome, mi pensas, ke ankoraŭ ekzistas multaj historioj por esti rakontataj. Mi ankaŭ pensas, ke sendube la mesaĝo estas grava. Krome, ju pli granda estas la kvalito de iu projekto, en ĝia kinarta valoro, des

“(…) ĉi tiu filmo ne hazarde alvenis al mi. Fakte mi devis fari ĝin. Mi povas diri, ke ĝi ŝanĝis mian vivon, ŝanĝis min, min transformis.”

pli bona estos por la ĝenro kiel tutaĵo. Tion ni provis fari en *Antaŭdestinito*. Ĝi estas filmo, kiu certe interesos la spiritistan publikon, sed ĝi vekas ankaŭ grandan intereson en aliaj homoj. Tiu estas bona vojo por la filmoĝenro ligata al la spiritismaj aferoj.

RIE: *Sendube, la karitata agado havas centran rolon en ĉi tiu rakonto. En konfliktaj tempoj, kiu estas la graveco venigi tiel konsolantan mesaĝon?*

Gustavo: Mi konsideras, ke tiu estas la precipa mesaĝo de la filmo. Tio estas io kerna por pasigi

al la homoj, sed ankaŭ por esti ricevata kaj absorbata de ili. La karitato, verdire, estas la rigardo al la aliulo. Ĝi estas la ago ne rigardi nur sin mem. En momento, mi eĉ pensis, ke la pandemio elaçetus tian emon pensi nur pri si mem, sed mi vidas, ke ne tio ekzakte okazis. *Antaŭdestinito* alportas tiun mesaĝon. Estas sceno, kiu aparte min tre emocias. Ĝi montras la momenton, kiam Arigó decidis akcepti sian mediumecon. Li estis hejme kaj aŭskultis la rumoron de publiko lin vokanta. Tiam, li malfermis la pordon kaj vidis la unuajn homojn, kiuj fakte bezonis flegadon aŭ kuracadon, sed kiuj ne havis monrimedojn, nek trovis helpon ĉe la publika povo. Li ĉirkaŭrigardis, vidis la vizaĝojn de la suferantaj homoj, kaj tio helpis lin decidi. Jen la rigardo al la aliulo. "Mi havas tiun ĉi mision!"

RIE: *Kiajn surprizojn kaj emociojn oni povas esperi el *Antaŭdestinito*?*

Gustavo: Emocio estas vorto, kiun oni povas ligi al la sperto ĉeesti ĉi tiun filmon, precipe por tiuj, kiel mi, kiuj ankoraŭ iom memoras lin vivantan. Mi svage memoras el mia infaneco, ke mi spektis televidan raporton pri li. Pro tio, la nomo ne strange sonis al mi, kiam oni vokis min fari la filmon. Mi eĉ pli surpriziĝis, kiam

mi ekkonis lian vivon! Por tiuj el pli juna generacio, estos certe tre interese, mi eĉ dirus, ankaŭ surprize, ekkonatiĝi kun tiu nekredbla figuro. Surprizo kaj emocio bone difinas la filmon.


RIE: *Lasu finan mesaĝon al la legantoj.*

Gustavo: Kiel finan mesaĝon, mi ŝatus nur diri ke, antaŭ ol fari ĉi tiun filmon, mi estis homo sen zorgo pri la spiriteco. Mi min tre pridemandis, ĉu mi devus fakte ĝin fari. Mi, kiu estas tiel for de ĉi tiu universo... Dum la proceso, preparado kaj filmado, mi havis spertojn tiom ŝokajn en mia vivo, kiuj donis al mi la certecon, ke ĉi tiu filmo ne hazarde alvenis al mi. Fakte mi devis fari ĝin. Mi povas diri, ke ĝi ŝanĝis mian vivon, ŝanĝis min, min transformis. ■

Nuntempe la filmo estas
spektebla ĉe la abonservo
www.telecine.com.br

MALHONESTA MEDIUMO

Anekdoto el la libro *Faktoj kaj fantazioj*, de Marjorie Boulton.
2a eldono. Roterdamo: UEA, 1993, p. 132.



Ekzistas multaj spiritistoj, kiuj sincere strebas al sanktaj scioj kaj virta vivo, sed ĉiu grego ie havas nigran ŝafon...

Knabeto akompanis sian patrinon al spiritista seanco. La mediumino vidis naivan infanon, kaj miele demandis:

— *Al kiu vi deziras paroli, knabeto?*

— *Al Avo.*

La mediumino eksilentis; ĉiuj atendis; subite el la buŝo de la mediumino vira voĉo klare demandis:

— *Kion vi deziras do scii, kara eta nepo?*

— *Kiel vi eniris ĉi tiun ĉambron, Avo, ĉar mi lasis vin sidanta en la aŭtomobilo?*

Per la aperigo de ĉi tiu anekdoto el la bonega libro de la angla aŭtorino M. Boulton (1924-2017) ni inaŭguras novan rubrikon en nia Gazeto. En “Ekster la rondo” ni publikigos spiritismajn faktojn el la esperantista literaturo kaj aldonos priajn klarigojn. Ĉi-foje la klarigo estis bonŝance *preta*. En la organo de Brazila Spiritisma Federacio, nome Reformador, aperis

en la numero de marto 1982 artikolo de Affonso Soares, kiu certe ĉion klarigos kontentige.

Tiu amuza anekdoto prezentas evidente kazon de *elvoko de vivantoj*. Ĉu eble? Ĉu ankaŭ enkarnuloj povas manifestiĝi spirite pere de mediumo? Legu la artikolon, kiu aperas la unuan fojon en la Internacia Lingvo, por ĉion kompreni. ■

Animismo, Mediumismo, Esperanto

El la portugala tradukis Affonso Soares | affonsobgs@gmail.com

“Ĉu oni povas elvoki la Spiriton de vivanto?”

Jes, ĉar oni povas elvoki enkarniĝintan Spiriton. La Spirito de vivanto povas, en siaj momentoj de libereco, prezenti sin ankaŭ *ne elvokite*; ĉi tio dependas de lia simpatio por la homoj, kun kiuj li komunikiĝas.”

*La libro de la mediumoj, ĉap. 25,
§284, demando 38.*

En ĉi demando kaj respektiva respondo, per kiu ni malfermas nian artikolon, troviĝas tuta, vasta fako de la spiritisma scienco, tiele grava, ke ĝi indis, fare de eminentaj scienculoj kiel Aleksandro Aksakof, Ernesto Bozzano, Gabriel Delanne, ampleksajn studojn, elvolvitajn en verkoj, kiujn oni rigardas, sen ajna favoro, klasikaj en la literaturo de la Spiritisma Doktrino.

Efektive, estas ja sur ĉi fundamento (eksterkorpa agado de vivuloj), interalie, ke sin tenas kaj sin trudas la fakta realeco de Spirito kiel moral-intelekta principo

de la homo, fonto de la penso, postvivanta la korpan diseriĝon, krom ankaŭ ke evidentiĝas la spiritisma hipotezo kiel prava klarigo pri la mediumaj fenomenoj.

Ernesto Bozzano, en sia verko *Pri enkonduko en la homan metasikion*, antaŭvidas ian fenomenan gradiĝon ĉe la manifestiĝoj de homvivantaj fantomoj, kio lin kondukas al brila kaj nekontestebla refuto al unu lia kolego en Scienco, kiu imputis al Spiritismo la akuzon provi “klarigi nekonataĵon per nekonataĵo”. Deire de la fenomenoj pri eksteriĝo de la sensiveco

kaj moveco, de ties aparteco de la nerva kaj muskola sistemoj; pri la agado de la homa volo, aparte de la fizika korpo, sur la materion, ĝin diserigante, transportante, reintegrante; pri la kompleta eksteriĝo de la animo, formanta ekster la fizika korpo ian “duoblaĵon” identan al la korpo, havantan ne nur kapablojn sensitivajn, intelektajn kaj moralajn, kiuj karakterizas la personecon de sensitivulo, sed ankaŭ aliajn superajn kapablojn, kiel vidado tra la korpoj, longdistanca vidado, klarvidado en la pasinteco kaj estonteco; deire do de ĉi fenomenoj oni venas, kun Bozvano, al du altvaloraj konkludoj:

(...) la spirito organizas la korpon, kaj la organizita korpo tute ne estigas la spiriton, kiel asertas la reprezentantoj de la oficiala scienco.

(...) se en la homo ekzistas ia fluideca korpo, envolaĵo de la spirito, kiu povas portempe disiĝi de la somata organismo, eĉ dum la surtera vivo, do la morto estas nenio alia ol definitiva disiĝo de la somata disde la fluideca korpo, riĉigita de la spirito.

Tiuj estas la konkludoj de la defendantoj de la spiritisma hipotezo, kiuj, kiel videble, procedas de tio konata ĝis tio nekonata.

Ĉe tiu sama ordo de ideoj, Aleksandro Aksakof, en la verko *Animismo kaj spiritismo*, starigas klasifikon por la fenomenologio:

fenomenoj estigataj de la eksterkorpa agado de vivanta homo, al kiu klaso li donas la nomon *animismo*; fenomenoj estigataj de la media agado de mortinta homo, al kiuj aplikiĝas la nomo *Spiritismo*. Animismo estas ia transiro al Spiritismo, kiu, siavice, konstituas pluan disvolviĝon de animismo. Ambaŭ klasoj, laŭ la eminenta rusa psikisto, povas enteniĝi en la ĝenerala nomo *mediumismo*.

Okazojn de tiu interesa fenomeno pri manifestiĝo de Spiritoj de vivantaj personoj ni trovas ne nur ĉe la supre menciitaj aŭtoroj, sed ankaŭ ĉe Allan Kardec, Gabriel Delanne, Léon Denis kaj aliaj. Ĉi-lastaj, en la ĉapitro XII de la monumenta verko *En la nevideblo*, prezentas riĉan studon pri la temo, raportante kazon de media manifestiĝo de vivanta homo, okazintan dum tri jaroj ĉe la grupo, kiun li gvidis en Turo. Ni transdonu la parolon al tiu fidela disĉiplo de Kardec:

Ne decus al ni ne menci la okazojn de eniĝo de vivantoj en la organismon de dormantaj mediumoj. Tiu speco de manifestiĝoj preskaŭ ĉiam enŝovas elementon de konfuzo kaj eraro en la fenomenojn de “tranco”, pro kio necesas senmanka sperto por ilin ne konfuzi kun la manifestiĝoj de elkarniĝintoj. – Efektive, la vivantoj eniĝintaj en fremdan organismon ne ĉiam

perfekte komprenas sian veran situacion.

Jen ekzemplo pruvanta kiom necesas, ĉe tiaj spertoj, ĉiam plej streĉe atenti.

Dum tri sinsekvaj jaroj, Spirito de vivanto povis manifestiĝi, per enkorpiĝo¹, en la grupo de ni gvidata en Turo, sen ke oni povus lin distingi disde la elkarniĝintaj Spiritoj, kiuj kutime vizitadis niajn seancojn. Pli pozitivajn detalojn li tamen al ni liveris pri sia identeco. Li diris, ke lia nomo estas B., kaj ke li estis sakristiano en la urbeto D., en la Departemento Sarthe. Lia treniĝa voĉo, lanta kaj laca gestado, kurba teniĝo kontrastis kun la teniĝoj kaj gestoj propraj al la mediumo kaj al la aliaj familiaraj Spiritoj. Ni lin tuj rekonis ĉe la unue diritaj paroloj. Tiam li ekrakontis plendetale la plej bagatelajn incidentojn de sia vivo, la admonojn de la parokestro pro lia pigro kaj ebrio, pro la malbona stato de la preĝejo kaj pastraj vestoj konfiditaj al lia zorgo, kaj eĉ siajn senrezultajn esplorojn en la Spaco kun la celo trovi konfirmon de tio, kion oni al li instruis! – Ĉio ĉe li – celoj, rememoroj, bedaŭroj – havigis al ni la firman konvinkon, ke ni interparolas kun elkarniĝinto.

Ne malgranda do estis nia surprizo, kiam iu membro de nia grupo, vizitinte la indikitan regionon kaj komisiite entrepreni esploron, informis al ni, ke B. ankoraŭ apartenas al ĉi mondo,

kaj krome estis vera ĉio, kion li diris al ni. Nia sekretario povis vidi lin kaj kun li konversacii. Jam maljuna kaj ĉiam pli kaj pli inklina al pigro kaj ebrio, li devis forlasi siajn funkciojn. Ĉiunokte, je la unuaj horoj, li enlitiĝis kaj profunde dormis. Li tiel povis elkorpiĝi, translokiĝi ĝis nia grupo kaj enkorpiĝi en unu el niaj mediumoj, al kiu li kroĉiĝis per ligiloj de afineco, kies kaŭzo ĉiam restis al ni nekonata.

Oni demandas, kiel povas la animo de vivantoj dumdorme produkti fenomenojn tiel surprizajn kaj kompleksajn. En iuj okazoj la aperoj, la materiigoj postulas grandan forton, profundan scion pri tio, kion ni nomas spirita kemio; kaj oni miregas, ke, apenaŭ apartiĝinta de sia karna envoljaĵo, la animo povas ekkompreni ties leĝojn.

*

Ĉi-komencaj konsideroj rilatas al mediuma poeziaĵo, subskribita de iu estulo K., psikografie skribita de Francisko Valdomiro Lorenz dum la monatoj junio kaj julio de 1944, kiu troviĝas en la verko *Voĉoj de poetoj el la spirita mondo*², eldonita de la Brazila Spiritisma Federacio en tiu sama jaro. La organizintoj de la libro jene sin esprimis pri la poeto K.:

Pri ĉi tiu poeto ni nenion povas diri nun. En estonta eldono de tiu ĉi libreto, ni mem aŭ niaj posteuloj diros ion.

Konsultante la jarkolekton de Reformador de 1944, ni trovis jenan noton en la rubriko *Eĥoj kaj faktoj* de la julia numero:

EMBARASA MEDIUMA OKAZO

En iu lando de la Centra Eŭropo loĝas granda esperantista poeto, kiun ni supozas vivanta kaj ĝuanta bonfarton, ĉar nenion nean ni trovis. Tamen, li, kiel Spirito, prezentiĝas al brazila mediumo, kun kiu li konversacias, kaj al kiu li diktas verkojn karakterize siajn. Neniu en la mondo verkas tielajn versojn, esprimojn de geniaj onomatopeoj. Ĉu vivas la korpo de la poeto, dormanta en ties malnova Patrolando? Aŭ ĝi jam mortis kaj la Spirito estas definitive libera? Nur post la milito, kiam restariĝos la poŝtaj rilatoj, povos niaj posteuloj ankoraŭ vivantaj esplori la aferon. Se la poeto ankoraŭ vivas, estos al li ĝoje legi siajn proprajn versojn, skribitajn tiel malproksime de sia korpo. Ni limigu nin al registro per inicialo, ke la kompleta nomo de la poeto restu kaŝita al tiuj, kiuj ne rekonas lian stilon.

Kalman Kalocsay, 1921.



BILDARCHIV AUSTRIA

Tuj post ĉi noto, Reformador presas unu el la pecoj de la poeto K., kiu, el la tri entenataj en la verko *Voĉoj de poetoj el la spirita mondo*, eble estas la plej impresa pro la formo kaj la enhavo, kaj kiu, laŭ Lorenz, estis ricevita en la 20a de junio 1944 je la 11a matene:

KIAM VENOS HELA TAGO?

Nigra nokto nubinunda.
Vintra vento boje blovas,
veajn versojn fajfe formas;
ronkajn rimojn hundoj hurlas.
Nokt' inundas nun naciojn;
fi-fier-furioj fulmas,
kanonpafoj tondre trafas,
tero en detruo dronas.
Ĉu ĉi tagoj de turmentoj
venis veki el dormado
la animon de l' homaro,
veki ĝin al vera vivo?
Ĉu l' ĉiel' la nigrajn nubojn
fordispelos per doloroj,
kaj komencos fine fidi
homoj al la ben' de l' bono
kaj kreiĝos nova mondo
kun konkeroj de l' kor-kredo?

K. Kaurio

Estas ja nenia dubo pri la identeco de K., esperantista poeto ti- am loĝanta en lando de Centra Eŭropo kaj pri kiu estas dirite, ke “neniu en la mondo verkas tielajn versojn”: temas pri Kálmán Kalocsay [1891-1976], rigardata kiel Princo de la Esperantistaj Poetoj. Kalocsay estis hungaro, naskita la 6an de oktobro 1891 kaj mortinta la 26an de februaro 1976. Kvankam ĉi tie ne estas la ĝusta loko por aprezi la grandecon de lia valoro kiel literatoro, ni tamen kredas utile informi, ke jam en 1934 *Enciklopedio de esperanto* dediĉis al li longan biobibliografian registron, asertante:

(...) en la estonteco ni ŝuldos al li tion saman, kion italoj ŝuldas al Danto kaj francoj al Ronsard.

*

Malgraŭ nia mallerta skribo pri ĉi-interesa okazo de media ma- nifestiĝo de Spirito de vivanto, ligita al nia amata Esperanto, ni tamen ankaŭ pensis atentigi la spiritistan junularon pri la neelĉerpebla trezoro de lecionoj entenataj en la tiel nomata klasika spiritisma literatu- ro, lecionoj, kiujn ni tute ne povas malŝati pro la risko fariĝi adeptoj sen kompleta preparo por la gra- vaj aktivecoj, al kiuj invitas nin la Doktrino. Ni rememoru la admo- non de la Spirito de Vero en komu-

nikaĵo diktita en Parizo, en la jaro 1860, entenata en la ĉapitro 6, §5, de *La evangelio laŭ spiritismo*: “Spiritistoj! Amu, jen la unua admo- no; instruu vin, jen la dua.”

Antaŭ ĉio ni amu unu alian, ĉar ni estas kristanoj, disĉiploj de Je- suo, kiu instruis, ke sole nur per tio ĉiuj homoj scios, ke ni estas Liaj disĉiploj: se ni havos amon unu al alia, tio estas, se ni unue praktikos fratan karitaton unu al alia, en la sino de niaj tendaroj.

Ni instruu nin, tio estas, ni amu ankaŭ la sanktan kaj konsolan Doktrinon, kiu al ni feliĉigas la koron, studante ĝin discipline kaj serioze, klopodante asimili ties puran esencon, kiu tuta tro- viĝas en unu mirinda kolekto da verkoj abnegacie kaj sinofere produktitaj de iu grupo da misiis- toj, komisiitaj de la Kristo por starigi sur la Tero la fundamen- tojn de la Promesita Konsolanto. Ni ĉiuj estas konvinkitaj ke, se al neni- u estus saĝe kaj prudente konfidi la respondecon pri la ple- numo de certaj specialaj funkcioj de la homa sciado al iu nur su- praĝe leginta kelkiom da paĝoj de popularigitaj verkoj, same mal- saĝa kaj senprudenta estus tiu, kiu aŭdacus plenumi gravajn, specialajn doktrinajn taskojn – kaj tiaj ja ekzistas! – nur pro tio, ke li legis iom da mediumaj me-

saĝoj, aŭ ĉeestis iujn doktrinajn prelegojn, aŭ leĝere kaj supraĵe delectiĝis je la intrigo de tiu aŭ tiu alia romano.

Ni ripetu: ni amu nin, jen la unua admono;
ni instruu nin, jen la dua! ■



Senpaga elŝuto
de la verko.



La verko enhavas originalajn poeziaĵojn de pluraj aŭtoroj, kiel Antoni Grabowski (1857-1921) kaj L. L. Zamenhof mem (1959-1917). En la dua parto de la libro legeblas tradukaĵoj de Francisco Valdomiro Lorenz el la unua libro mediume verkita de Francisco Cândido Xavier, nome *Parnaso de além túmulo* (*Transtomba parnaso*).

1. (Redakcio) Vidi *La libron de la mediumoj*, ĉap. 14, §166, *Parolivaj mediumoj*. Sur paĝo 69 de nia revuo vi trovos manieron senpage elŝuti la verkon.
2. (Redakcio) *Nica literatura revuo*, en 1956, publikigis numeron aparte dediĉitan al Brazilo. En ĝi legeblas la artikolo "Brazilo kaj spiritismo", de A. Nurak, kiu interalie mencias la libron *Voĉoj de poetoj el la spirita mondo* kaj la poemojn de K.: "(...) min surprizis la atribuo de tri poemoj al iu mistera K." Nurak transskribas "Kiam Venos Hela Tago" kaj parton de la poemo "Pacienco", kaj aldonas: "Kurioze, ke ĝuste tiuj duoble anonimaj poemoj estas inter la plej frapaj en la libro." La artikolo finiĝas per demando de la aŭtoro: "Kia ajn estas nia opinio pri la trans- aŭ cismorta origino de tiuj versoj, ĉu vi ne trovas, ke ili estas indaj je cito kaj memorigo?" (*Nica literatura revuo*, 1a jaro, n-ro 5, majo-junio 1956, p. 189-192)



13a BRES

Frateco sen Limoj: karavano al Madagaskaro

Nia revuo en Kanado

Monda Spiritisma Kongreso

Vizito al spiritisma organizaĵo en Francio

Gazeto de BAES dum la 107a UK

13a BRES

Brazila Renkontiĝo de Esperanto-Spiritistoj



ANDRÉ YOSAN

(De maldekstre) Eli Abrahão kaj Inácio Yosan pozas ĉe la enirejo.

Esperanto-spiritistoj en Brazilo fake kunvenas, renkontiĝas, kongresas jam dum jardekoj, sed la unuan fojon en laŭnome tutlanda evento nur en 2006, antaŭ la fonda de Brazila Asocio de Esperanto-Spiritistoj (BAES) mem, kiu ekde 2008 respondecas pri la Brazila Renkontiĝo de Esperanto-Spiritistoj (BRES).

Post du jaroj da virtualaj eventoj, BRES denove okazis fizike la 22an kaj 23an de aprilo. Ĉi-foje en la urbo Uberlândia, kiu cetere gastigis la 2an Renkontiĝon, en 2007. Partoprenis esperantistoj el ses brazilaj ŝtatoj. Entute estis 24 aliĝintoj, ĉeestis 14. Al tiuj, kiuj ne povis finfine partopreni ni sendis la renkontiĝajn materialojn.

Dum la evento okazis ankaŭ Esperanto-kurso por komencantoj, al kiu aliĝis 32 personoj, partoprenis 20. Gvidis la kurson Cícero Gabriel (Kikero), sperta esperantisto, redaktoro de Brazila Esperantisto, organo de Brazila Esperanto-Ligo (BEL).

Dum la malfermo kantis glernantoj el Eduka Centro Eurípedes Barsanulfo – lernejo, kiu gastigis la eventon. Al la instruistino, Letícia Araújo, ni elkore dankas! Ni dankas ankaŭ al Kikero, kiu ludis gitaron kaj kunkantis kanzonon tradukitan de li mem, nome *Semo de l' morgaŭo* (pt: *Sementes do amanhã*, de Erasmo Carlos).


Néia Lúcia, respondeca persono ĉe Biblioteko Carlos Domingues, la biblioteko de BEL, aranĝis sukcesan brokantan libroservon kun multe da valoraj presaĵoj. Ĉio disvendiĝis, kaj la sumo trafos en la bibliotekan kason. Néia kunportis ne nur brokantajn varojn, sed ankaŭ historiajn duoblaĵojn por la arkivo de SEA. Malbrokantantan vendadon de libroj kaj esperantaĵoj aranĝis la organiza teamo de la evento. Libroj el Eldonejo Lorenz konsistigis la stokon.

La programo inkluzivis ekspozicion de historiaj eroj el la Esperanto-spiritisma movado, ekskurson al la iama loĝdomo de la fama mediumo Chico Xavier, en la najbara urbo Uberaba, kaj fruktodonan

agadon por la librokampanjo Abel Gomes. La partoprenantoj kunlaboris je la pretigo de librokompletoj, kiujn BAES donacas al unuopuloj kaj al bibliotekoj de spiritismaj societoj. La Kampanjo, fondita en 2021, celas provizi precipe la bibliotekojn de spiritismaj societoj per spiritisma literaturo en Esperanto kaj per lernolibroj de la Internacia Lingvo. Entute pretiĝis pli ol 40 pakaĵoj kun almenaŭ po kvin libroj.

Ĉefprelegis Elmir de Lima, el Rio-de-Ĵaneiro. Fábio Fortes finfine ne povis partopreni, kaj la traduka konkurso, pli frue anoncita, ne lanĉiĝis. Ĝi estas prokrastita al la venonta ĉeesta evento. Instiga estis la programero pri tradukarto, kadre de kiu estiĝis terminologia diskuto, kiu estontece rezultigos eseojn kaj artikolojn por nia revuo.

Sabate, okazis arta vespero. Kadre de ĝi prezentiĝis i.a. Kikero. Li iris sur la scenejon kaj anoncis, ke li recitos la poemon *Preĝo sub la verda standardo*. Mediumino, kiu preferas resti anonima, raportis poste kion ŝi spertis dum la recitado. Jen ŝi eksentis la ĉeeston de supera estulo laŭ la spirita hierarkio¹. Li recitis la poemon kune kun Kikero. La etoso, laŭ ŝi, estis tre emocia. Ŝi demandis sin, kiu estas tiu. Responde ŝi ekaŭdis: "Tiu estas la aŭtoro mem." La poemon ŝi ne konis, sekve ŝi ne konis la aŭto-

ron – ja Kikero ne diris, kiu verkis ĝin. “Ĉu Zamenhof?” , ŝi tamen pensis... sed hezitis. “Ĉu Zamenhof, en tiel simpla loko?” Tuj ŝi aŭdis respondon: “Ĉu Jesuo² ne diris, ke tie li estus, kie kunvenus je lia nomo du aŭ pli da personoj? Kial do Zamenhof ne povus esti ĉi tie?” La okazintaĵon ŝi raportis al la prezidanto de la evento, kaj nia revuo ĝin publikigas kun ŝia permeso. 

Kurioze, post la recito de la unuaj versoj, Kikero hezitis kaj eksilentis. Li momente perdis la fadenon en la parolo. Li preferis rekomenci... kaj senstumble findeklamis la tutan poemon, inkluzive de la lasta, sesa³ strofo, kiun Zamenhof ellasis en Bulonjo-ĉe-Mar, okaze de la 1a Universala Kongreso, en 1905:

**Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen, senfine!**

Dimanĉe ni vizitis Parkon Siqueroli. La estado tie estis tre plaĉa, sed bedaŭre la jogopraktiko ne povis okazi, pro manko de formala permeso de la urbodomo – la organiza komitato ne supozis la neceson havi eksplicitan permesodokumenton. Malgraŭ tio estis agrablaj babilado kaj kunpromenado en tre amika etoso. En la sama

tago okazis ankaŭ Ĝenerala Asembleo, kadre de kiu estis diskutita kaj aprobita nova statuto – post kelkaj monatoj, kadre de nova asembleo, ŝanĝiĝis ankaŭ la nomo de la Asocio.

Ni menciuj la helpon de Spiritisma Grupo Paŭlo el Tarso, kies skipo tre volonte kaj afable partoprenis la organizadon de la 13a BRES.

La teamo ebligis surlokan manĝadon, purigadon kaj gastigadon al ĉiuj partoprenantoj. Ankaŭ membroj de SEA kunlaboris. João Otávio respondecis pri akceptado, Rodrigo Mendonça agadis antaŭe pretigante regalaĵojn, afiŝojn, bonvenigan rubandon, kaj dum la evento deĵoris ĉe la libroservo. Maria Eurípedes zorgis pri pluraj organizaj detaloj surloke. André Yosan fotis (sen li apenaŭ ekzistus aŭdvidaj rememoraĵoj el la evento). Aida Maria manfaris esperantaĵojn por vendi ĉe la libroservo, favore al la Asocia kaso. Reynaldo Allan vizitis la eventojn pli frue kaj proponis plurajn aferojn, kiuj decide kontribuis al la sukceso la de organiza laboro.

En 2024, nia jara evento, jam sub la nova nomo SER (Spiritisma Esperanto-Renkontiĝo), okazos ne fizike, sed virtuale, en aprilo. Fizika evento okazos ĉiun duan jaron. Pliaj informoj sur paĝo 71. ■

**Ĉu Jesuo ne diris,
ke tie li estus, kie
kunvenus je lia
nomo du aŭ pli da
personoj? Kial do
Zamenhof ne
povus esti ĉi tie?**


Mallongigita versio de ĉi tiu raporto aperis en *La ondo de esperanto*, n-ro 2, 2023. Legu pri la revuo ĉe sezonoj.ru/la-ondo.

-
1. Vidi *La libron de la spiritoj*, 2a parto, 1a ĉapitro.
 2. Mateo, 18:10 (Ĉar kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili.)
 3. *Esperanta antologio*. UEA, 1984, p. 6.



CIUJ FOTOL: ANDRÉ YOSAN







14



15



16





17



18



19



20

Pri la fotoj

1. Kantado antaŭ la malfermo.
2. Infanoj el Eduka Centro Eurípedes Barsanulfo kantas esperante dum la malfermo. En la dirita Centro, kiu estas elementa lernejo, Esperanto estas komuna lernobjekto, egalrange kun la angla.
3. Afiŝoj kun inspiraj tekstopecoj estis plurloke fiksitaj.
4. Partoprenantoj sabate post la lasta programero.
5. Prelego de la ĉeftemo. Staras kaj paroladas Elmir dos Santos.
6. Leandro Abrahão dankas kaj adiaŭas Elmir, kiu ne povis resti longe post la programero.
7. Suzana Pitombo prezentas dum la Movada Forumo.
8. Ĉiĉeronado ĉirkaŭ eksponitaj historiaj eroj el la Esperanto-spiritisma movado.
- 9-10. Kolektiva pretigado de librokompletoj por Kampanjo Abel Gomes. Entute pretiĝis 46 pakaĵoj kun po kvin aŭ ses libroj.
11. Afiŝo sur muro de la ejo, kie okazis diversaj agadoj, inkluzive de la malfermo kaj fermo.
12. Libroservoj.
13. Vespera babilado.
- 14-15-16 Paralela Esperanto-kurso kun la esperantisto Kikero.
17. Ekskurso al Parko Siqueroli.
18. Ekskurso al la iama loĝdomo de Chico Xavier, en Uberaba. Kikero rigardas psikografiaĵojn de Chico, eksponitajn en aparta ĉambro.
19. Infanoj partoprenas la ekskurson. Denaskaj esperantistetoj, de maldekstre Ana Abrahão, Sol Abrahão kaj Eli Abrahão.
20. Diplomo por finintoj de la Esperanto-kurso.

FRATECO SEN LIMOJ

Grupo de volontuloj helpocele karavanas al la suda parto de Madagaskaro, Afriko.



*Oficiala
esperantlingva
marko.*

FRATECO
SEN LIMOJ

Frateco sen Limoj (FSL) estas homama organizaĵo, kiu agadas en bezonantaj regionoj tra la mondo kun la celo forigi malsaton kaj antaŭenigi pacon. Ĝi fondiĝis en 2009 kaj jam enkondukis helposervojn, kiuj bonfaras al familioj kaj miloj da senprotektaj infanoj kaj junuloj en pluraj afrikaj landoj, ankaŭ en Haitio kaj Brazilo. FSL vekis atenton de multaj publikaj personoj, kiel geaktoroj kaj muzikistoj, kiuj komencis subteni kaj diskonigi la agadon de la organizaĵo.

Danke al volontula kontribuo de multe da personoj kaj plurspecaj fakuloj, FSL periode karavanas por surloka agado. Jader Rodrigues da Silva, membro de SEA kaj ties multflanka bonfaranto, sendis al nia redakcio kortuŝan raporton de vojaĝo, kiun li kunentreprenis al Ambovombo, en la suda parto de Madakaskaro, kie troveblas komunumoj vivantaj en malfacilaj materiaj kondiĉoj, ne nur pro malsanoj kaj malsato, sed ankaŭ pro sekeco kaj sablotempestoj.

En Ambovombo, FSL konstruis *Vilaĝon de Frateco*, kie la loĝantaro lernas plurajn metiojn, ekzemple manartaĵon, kudradon, panfaradon, ĉarpentadon, brikofaradon,

legomĝardenadon kaj rearbarigadon. Krom tio FSL establis sanservon, kiu estas referenca en la regiono, kaj dek nutrocentrojn.

La vojaĝo celis kontribui al la inaŭguro de la lernejo Horova per purigado, farbado, arbo- kaj florpantado, kaj elnombrado de gelerntoj – la kvanto da analfabetoj tie estas tre granda. Entute 124 infanoj kaj junuloj matrikuliĝis. Surloke estis starigita komisiono por elekto de instruontoj.

La karavano vizitis i.a. ĉiujn metiejojn kaj du nutrocentrojn. Deĵoris volontula kuracisto el Brazilo. La skipo vizitis ankaŭ alian lokon kun urĝaj bezonoj je nutraĵoj kaj trinkinda akvo.



JADER RODRIGUES

Intervjuo por elektado de lokaj instruistoj (Jader estas montrata per trianguleto).

Scenoj el la agado de la karavano.



CIUJ FOTOJ: JADER RODRIGUES



Antaŭ la forveturo al Ambovombo, la vojaĝantoj aĉetis en la ĉefurbo de Madagaskaro la necesajn materialojn por la metiaj aktivaĵoj kaj por la fondota lernejo.

Ne la unuan fojon Jader karavanas kun FSL. Almenaŭ ĉi-foje li povis eĉ kontakti lokajn esperantistojn. Menciindas la izoleco, kiun nia raportinto devis sperti pro infektiĝo je Kovim-19. Malgraŭ tio li povis partopreni parton de la surloka agado. ■



PARTOPRENU!



Financa subteno
(unuopaj donacoj).



Aliaj manieroj
kontribui.

www.fraternidadesemfronteiras.org.br

relacionamento@fraternidadesemfronteiras.org.br

Sidejo: Rua Praia da Pituba, 53, Jd. Autonomista, Campo Grande, Brazilo.

Nia revuo en Kanado



Danke al s-ino Graça Thuler, membro de SEA, Gazeto de BAES alvenis en Kanado por la 107a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Montrealo.

Ŝi kompletis kunporti kelkajn ekzemplerojn al la evento, por disdoni ilin al reprezentantoj de kelkaj organizaĵoj dum la tradicia Movada Foiro, sed ŝia valizo misvojiĝis. Eĉ vestaĵojn kaj tualetaĵojn ŝi devis aĉeti surloke. En tiaj okazoj oni esperas rehavi siajn posedaĵojn, sed oni povas nur esperi. Bonŝance, post kelkaj tagoj la flugkompanio liveris al ŝi la malaperintan pakaĵon, kaj ŝi po-

vis finfine disponi pri la numeroj de la Gazeto. Bedaŭre, pro la valiza afero, ŝi maltrafis la Foiiron. Alternative, s-ino Graça petis permeson lasi la ekzemplerojn de la revuo ĉe la kongresa akceptejo, por ke interesitoj povu forpreni laŭplaĉe. Ŝi kompreneble ne staradis proksime ĝis malapero de la lasta el ili... ŝi simple pro scivolo reiris tien poste por konstati, ĉu la ekzempleroj estas forprenitaj. Nu, ĉiuj forpreniĝis. Ni esperu, ke ili trovis legemulojn.

Al s-ino Graça ni kore dankas! ■

10a Monda Spiritisma Kongreso

www.10cem.com



De la 14a ĝis la 16a de oktobro 2022 Internacia Spiritisma Konsilio (CEI) partnere kun Franca kaj Francilingva Spiritisma Unuiĝo (USFF) realigis la 10an eldonon de la Monda Spiritisma Kongreso.

La aranĝo estis tute virtuala, kun senpaga kaj ekskluziva elsendo per jutubkanaloj de la organizantoj kaj aliĝintaj federacioj. Ne necesis antaŭa registriĝo.

Reprezentantoj de la internacia spiritisma movado partoprenis prelegojn kaj diskutrondojn. Prelegis i.a. Divaldo Franco, Jorge Elarrat, Richard Bueno, Edwin Bravo kaj Jussara Korngold.

Parto de la programo havis samtempan tradukon al la lingvoj portugala, hispana, angla kaj franca. Aliaj programeroj estis nur en la angla.

La ĉeftemo de la kongreso estis "Intima Reformo". Laŭ Allan Kardec mem:

La esenca celo de spiritismo estas la plibonigo de la homoj. En ĝi oni serĉu nur tion, kio povas kontribui al ties progresoj morala kaj intelekta."¹ ■

1. Allan Kardec, *O espiritismo em sua expressão mais simples* (*Spiritismo en sia plej simpla esprimo*). FEB, ĉap. 1, §35.

FRATA ESPERO

Evangelio, spiritismo kaj Esperanto atingantaj multajn korojn



Raportas la prezentantoj de la jutuba programo:
Affonso Soares, Belmiro Alves, Elaine Kapp,
Geraldo Campetti kaj Givanildo Costa.
Instagrama konto: @frata_espero



“

*Nia signalo al la kunuloj ankoraŭ ne spertis
ŝanĝon. Evangelio, Esperanto kaj Spiritismo
konsistigas al ni, en la nuno, benatan trilogion
de laboro por pluraj enkarniĝoj.¹*

Abel Gomes (spirita aŭtoro)

Movate de tiu idealo de frateco kaj devo je ĝi, la radio *Deus Conosco (Dio kun ni)*, partnere kun Brazila Spiritisma Federacio, planis monatan renkontiĝon por diskonigado de Esperanto per dumokazaj elsendoj, podkasto, sociaj retoj kaj ankaŭ per la propra revuo.

Frata Espero estas la nomo donita al la programo portugallingve elsendata en la kvara dimanĉo de ĉiu monato, je la 9a matene (UTK-3), partnere kun aliaj pli ol 20 kanaloj. La programo daŭras unu horon kaj trionon kaj konsistas el la jenaj eroj: iom da rakonto de Esperanto, konsiletoj pri lernado de la lingvo, muziko en Esperanto, lego de po unu mesaĝo el la libro *Palavras de luz (Vortoj el lumo)*² kaj el la rubriko *Esflorando o evangelho (Elvolvante la evangelion)*, el la revuo Reformador, krom diskonigado de novaĵoj el la spiritisma kaj esperantista movadoj.

La prezentantoj de la programo estas Geraldo Campetti kaj Elaine Kapp, kaj la intervjuatoj estas Affonso Soares kaj Givanildo Costa. Krome estas okazaj partoprenoj de specialaj invititoj. La teknikisto pri elsendado estas Belmiro Alves.

Dum la pandemio Kovim-19, kiam oni multe parolis pri espero kaj frateco inter la popoloj, ekestis la nomo de la programo.

En la 28a de februaro 2021, komenciĝis la sinsekvo de monataj elsendaj renkontiĝoj, kun nocioj pri tio, kio estas Esperanto kaj pri ĝiaj fundamentaj reguloj. Tiam la partoprenantoj sentis la ĉeeston de spiritoj stimulantaj la agadon. Ekde tiu memorinda okazo, ĉiumonate estas pritraktataj temoj kiel la kreo kaj diskonigado de la lingvo de frateco, ĝia rilato kun spiritismo, mediumaj mesaĝoj koncernantaj Esperanton, homaranismon, organizaĵojn kiuj agadas por la neŭtrala internacia lingvo, manierojn lerni la lingvon, esperantan arton kaj kiel kontribui al la afero de frateco.

La komenca celo, senpretenda, pri konversacia rondo, tuj altiris esperantistajn korojn, kiuj komencis kunlabori dum ĉiu programo, por la preparado de la sekvaj. Ne longe poste, homoj, kiuj ne konis Esperanton, komencis spekti la elsendojn kaj jam sciigas, en la komentejoj, pri la propraj iniciatoj lernadi kaj disvastigadi la lingvon.

Frata Espero altiris la intereson de multaj partneraj elsendkanaloj, ĉefe de la spiritisma movado, ankaŭ de federacioj kaj spiritismaj societoj. Reelsendante la programon, ili komencas aŭ kompletas siajn aktivecojn, kongrue kun la rekomendo el la gvidlibro *Orientação ao centro espírita (Orientado al la spiritismaj centroj)*, kiu tekstas:

Stimuli kaj, laŭ la ebloj, favori la studadon de Esperanto, pro ties alta humaneca principo kaj sento de universala frateco, kiujn ĝi disvolvadas, kaj ankaŭ pro tio, ke ĝi montriĝas kiel helpilo en la disvastigado de la spiritisma doktrino en aliaj landoj.³

Ĉar la programo estas prezentata por tiuj, kiuj jam regas la lingvon

aŭ kiuj ankoraŭ lernas ĝin, kun eroj kompreneblaj por ĉia partoprenanto, la celpubliko konsekvence fariĝis heterogena. Pro tio, la perspektivo kaj la espero de la organizantoj estas, ke pli kaj pli Esperanto iĝos konata inter spiritistoj, kaj spiritismo, inter esperantistoj. Ĉiu eta kontribuo al tio iras per firmaj paŝoj laŭ la celoj de amo kaj frateco instruitaj de Jesuo. ■



Jen estas mia ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel mi vin amis.

Johano, 15:12

1. Mesaĝo mediume verkita de Francisco Cândido Xavier, publikigita en la revuo Reformador, novembro 1948, p. 20.

2. Emmanuel (spirita aŭtoro), *Palavras de luz*, mediume verkita de Francisco Cândido Xavier, FEB.

3. *Orientação ao centro espírita (Orientado al la spiritismaj centroj)*. FEB, 2021, p. 55.

Spiritismo en Francio

Vizito al spiritisma societo en la naskiĝlando de Allan Kardec.

Raportas Gustavo Magalhães | gumagal77@gmail.com



GUSTAVO MAGALHÃES

Post tiom da jaroj, dum kiuj mi vizitadis la saman spiritisman centron en Belém¹, Brazilo, kaj preparadis min por eksterlanda universitata interŝanĝo, en Francio, mi demandis min, kiel estus vizito al spiritisma societo en la lando de Allan Kardec, monda kulturcentro en la 19a jarcento. Per la reto mi multe esploris pri spiritismo en Francio kaj malkovris, ke en la urbo kie mi loĝos unu jaron ne ekzistas spiritisma organizaĵo – kio iom malĝojigis min.

Post kelkaj studplenaj monatoj, pli plenaj, ol mi supozis antaŭe, finfine mi povis entrepreni vojaĝon al

la metropolo Liono, naskiĝloko de Kardec, por viziti Centre *Spirite Lyonnais Allan Kardec* (Liona Spiritisma Centro Allan Kardec) okaze de helPOSEANCO, kaj por iom turisti tra la urbo.

Situanta en loĝregiono de Bron, en la ĉirkaŭaĵo de Liono, la centro troveblas malantaŭ pluretaĝa konstruaĵo, kaj disponas pri sufiĉe vasta salono rigardanta al ekstera ĝardeno. Mi alvenis la 2an posttagmeze, kaj baldaŭ aliaj personoj komencis alveni. Mi serĉis respondecan personon, por ekscii kiel funkcios la seanco, kaj portugala sinjorino afable donis al mi la necesajn informojn.

Komence okazis gvidata duonhora meditado dum kiu la prezidanto diradis faciligajn vortojn al la ĉeestantoj. Ĉe la pretigita ĉeftablo en la salono jam sidis pluraj parolaj kaj skribaj medioj en preĝa sinteno. Post la meditado ili komencis peri komunikaĵojn celantajn konsoli la ĉeestantojn, inkluzive de leteroj direktitaj al certaj personoj el la publiko. Ĝenerale la kunveno pasis tre glate, kaj mi sentis min trankvile kaj bone.

Iuj aferoj mankis al mi, kiel ia aktiveco por infanoj - io tre ofta en Brazilo. Krom tio mi ĝojus vidi ian artan agadon, kiel spiritisman muzikon.

Multaj el miaj geamikoj miras kiam mi diras, ke en Francio estas nur kelkaj dekoj da spiritismaj organizaĵoj kaj nur kelkaj miloj da adeptoj, dum la plimulto el la loĝantaro eĉ ne scias kiu estas Allan Kardec. Tio estas tre tristiga. Sed mi komprenas, ke la cirkonstancoj fariĝis tiaj pro la kolektivaj traŭmoj spertitaj de eŭropaj popoloj dum la 20a jarcento – kio igas multajn el ili kontraŭstari ĉiajn similajn manifestiĝojn. Mi esperas, ke tio ŝanĝiĝos en la venontaj jardekoj kaj ke pli da homoj komprenos la bonon, kiun alportas la studado kaj praktikado de spiritismo. ■



GUSTAVO MAGALHÃES

Salono.

1. Ŝtato Pará.



Fasado. La nigra pordo malfermiĝas al la koridoro, kiu kondukas al la salono, malantaŭ la pluretaĝa konstruaĵo.



Ŝranko kun valoraj historiaj eroj.



Librovendejo en la salono.


NOTICOJ

El la portugala tradukis Joel do Ó | joelsdoon@gmail.com

Mesaço de Abel Gomes (1876-1934), medieme verkita de Francisco Cândido Xavier. El la libro *Falando à terra* (*Parolante al tero*), 1a biteldono. Braziljo: FEB, 2023.



1a eldono, 1951.



1a biteldono, 2023.

Mi ĉiam pensis kapti okazon turni min, kiom eble simple, al popola menso, rilate al transmonda vivo, por ke iluzioj sterniĝantaj super la fenomeno morto estu kontraŭstarataj en ĉiuj lokoj de la terĝlobo.

La ceremonio kaj konvencio karakterizantaj funebraĵojn tre multe malfaciligas nian kampanjon por mensa liberiĝo.

Katafalko, nigra krepo, brulantaj kandeloj kaj malĝojaj kantoj uzataj de la eklezio, kiu, jam de jarcentoj, influas niajn sentojn, stampas tiom grandajn teruraĵojn ĉe la animo ĵus elkarniĝinta, ke nur kelkaj Spiritoj jam havantaj superajn sciojn sukcesas eviti al si senkuraĝigajn timojn, kiuj, ne malofte, longe daŭras.

Ni mensogus, se ni asertus, ke la transiĝo en la spiritan mondon estas ordinara okazo samspeca por ĉiuj.

Ĉiu homo havas sian propran vojon de li pavimitan por eliri el la fizika mondo, same kiel okazas ĉe la naskiĝo.

Dum nia ekzistado, ni komen- cas aŭ rekomencas certajn tas- kojn. Trans la tombo, ni daŭrigas tiujn komencitajn laborojn, aŭ fariĝas sklavoj de malbonoj de ni faritaj sur Tero, kio vidigas, ke nia mensa stato ludas gravan ro- lon, se konsideri la karakterojn de la subtila materio, en kiu la Spirito ekloĝas tuj post forlaso de sia fizika korpo.

Multnombraj homoj, pro man- ko de sufiĉa meditado pri la "mi", kroĉiĝas al restaĵoj de sia propra korpo, per obstineco tiel forta, kia de naiva vojaĝanto, kiu, pro timo antaŭ io nekonata aŭ ne- kapablo uzi siajn proprajn kru- rojn, vane proponus al si mem restarigi sian mortan ĉevalon.

Ekzistas ankaŭ aliaj turmenta- taj animoj, kies nombro estas multe pli granda. Ili ne ligiĝas al sia putriĝinta kadavro, sed longe restas ĉe siaj surteraj hejmoj, kie ili malligiĝis de siaj malsanaj ĉeloj fizikaj. Ili ankoraŭ tenas iluziojn aŭ neesprimeblajn suferojn deve- nantajn de ilia enkorpa vivo.

Multaj el tiuj lasintaj sin regi de siaj malsanoj kaj ankaŭ plifortigi- ntaj kaj dorlotintaj ilin, ne pro fi- deleco al Diaj ordonoj, sed ja por seniĝi je la devoj truditaj al ili de la vivo, longe restas kun la samaj simptomoj kaj kriplaĵoj, malhar- monio aŭ vundoj, kiuj manifes- tiĝas ĉe la duonmateria kaj plas- tika korpo spirita. Simila proble- mo postulos tre penigan laboron por taŭga solvo.

Tiaspecajn animojn senkonso- lajn kaj korpremitajn oni povas kalkuli je miloj, en ĉiu ajn regiono de la spirita rondo limigantaj la laborzonon, en kiu agas la enkar- niĝintaj homoj. Kiam permesas cirkonstancoj, ili estas enhospita- litaj ĉe grandaj kaj kompleksaj hospitaloj, apud la surtera regio- no; oni konstatas, ke miloj el ili tenas sin en subhoma stato men- sa, ribelaj kontraŭ ĉia renoviga procezo. Multaj restas en profun- da malvigleco ĉe la domo, kie ili vivis iujn sinsekvajn jarojn. Ili havas la samajn kutimojn de la tempo, kiam ili estis enkarniĝin- taj, kaj sorbas vivajn substancojn de la hejma medio, sen kuraĝo iri antaŭen. Kiam ili evidentigas sig- nojn de spirita pliboniĝo, ili estas senprokraste akceptataj en edu- kaj institucioj najbaraj al Tero, kio plibonigas ilian spiritan sta- ton eksteran, laŭmezure kiel ili

interne pliboniĝas, malkrudigas siajn sentojn kaj sintenojn, kaj plifortigas sian entuziasmon lerni donitajn instruojn, dum ili plenumas proponitajn taskojn celantajn ilian memperfektigon. Ĉar ili katenas siajn mensajn energiojn al surteraj bildoj, el kiuj ili jam fizike malligiĝis, ili malrapide ŝanĝas konceptojn kaj opiniojn, kaj restas kvazaŭ mense paralizitaj. Ili estas veraj demenculoj ĉe la spirita vivo, same kiel estus freneza iu enkarniĝinta homo, kies menso tute ligiĝus al okazoj, personoj kaj aferoj koncernantaj pasintajn ekzistadojn.

Tiuj Spiritoj vagadas inter la enkarniĝintoj, kvazaŭ ili estus somnambuloj travivantaj koŝmarojn kaj sonĝojn, kiel faktajn realaĵojn, ĉar la mensa ondo elfluanta el iliaj turmentoj esprimas sin per retroira movo serĉanta ilian pasintecon, al kiu ili ligiĝas, kaj sur kiu ili koncentras sian konsciencon.

En tiaj revenoj al sia pasinteco, la animo similas al tiu proprietulo de grava konstruaĵo pluretaĝa, kiu prefere vivas en subetaĝo, en intima apudesto kun strangaj kaj teruraj restaĵoj ŝanĝiĝintaj subite kaj portempe, en grandegan legion da fantomoj, kiuj, per potenco de mensa elvoko, denove fariĝas vivaj. Li, kiel viktimo de siaj propraj menskreaĵoj monstraj kaj turmentaj, implikiĝas, kelkfoje, dum longa tempo, en reto de krudaj aŭ sen-

Lastatempe, mi esploras vastajn koloniojn devenintajn de civilizacioj jam de longe malaperintaj kaj troviĝantaj nun ekster ĉia homa observado. Moroj, artoj kaj lingvaj fenomenoj estas studataj en mirindaj detaloj, ĉe la fontoj, el kiuj ili devenas.

disciplinaj pensoj, kaj travivas neesprimeblajn afliktojn, kvazaŭ homo profunde dormanta, kiu ŝvitas kaj ploras pro nedireblaj suferoj kreitaj de lia propra menso. Li kredas, ke li estas en granda torturejo.

Instruistoj de filozofiaj aŭ religiaj principoj asertas, ke ĉiu individuo vivas en sia propra mondo mensa, t.e. ĉiu menso vivas, dum sia evolua procezo, vivon kongruan kun la jam atingita fazo de evoluo supera aŭ malsupera.

Estuloj, sur nia mondo, grupiĝas laŭ leĝo de afineco, t.e. laŭ la mensa ondo aŭ "vibra frekvenco", kiun ili elsendas.

Lastatempe, mi esploras vastajn koloniojn devenintajn de civilizacioj jam de longe malaperintaj kaj troviĝantaj nun ekster ĉia homa observado. Moroj, artoj kaj lingvaj fenomenoj estas studataj en mirindaj detaloj, ĉe la fontoj, el kiuj ili devenas.

Liberiĝinta, animo antaŭeniras sen katenoj ligantaj lin al pasinteco, kaj forgesas malnovajn kutimojn tiel same, kiel ĵus naskita kokido disŝiras kaj lasas for la senutilan kaj striktan envolvajon, el kiu ĝi naskiĝis, por libere spiri kaj plifortigi siajnflugilojn; male, ekzistas miloj de Spiritoj plenaj de pasio al eksteraj formoj. Ili restas longan tempon en tiuj ko-

lonioj, ĝis sentoskuoj aŭ konscienciproĉo kondukos ilin antaŭen aŭ al nova enkarniĝo sur Tero.

Ĉiu mensa tipo vivas en sfero, kies karaktero plej forte lin altiras.

Tia koncepto ne kaŭzas surprizon al ordinara scienco, ĉar, eĉ sur nia mondo, ne malofte, en malvastata regiono kunekzistas kristalo kaj arbo, amebo kaj afido, fiŝo kaj bufo, reptilio kaj formiko, hundo kaj birdo, sovaĝulo kaj civilizito, kiuj spiras saman aeron, manĝas samajn nutraĵojn, sed vivas ĉiu en sia aparta mondo.

Krom tiuj havantaj bedaŭrindajn kriplaĵojn psikajn, kiuj maniĝas en la subtila histo de ilia spirita korpo, ne estas malfacile trovi multajn homojn jam sen ties korpa envolvajono, mense vivantaj en tre malproksimaj epokoj. Kutime, ili alproksimiĝas al tiuj havantaj samajn ideojn kaj memorojn, kaj kreas, per tiuj stagnaj memoroj, nebulan kadron de vivaj bildoj, en kiuj ili vivas. Ili kreas, per sia menso, bildojn similajn al tiu priskribita de la fama poeto florenca, granda medio, aŭtoro de *La dia komedio*.

"Purgatoriaj Inferoj" estas de diversaspecaj kategorioj. Ili respondas al tiu speco de koŝmaro aŭ rimorso, kiun la animo kreis al si mem.

Tiaj spiritaj lokoj havantaj la saman densecon de la mensoj ilin kreantaj estas kompreneblaj kaj justaj.

Kie troviĝas miloj de estuloj agantaj kontraŭ si mem, teruritaj de bildoj kaj krioj devenantaj de ilia propra konscienco, kaj kreantaj angorajn kaj dolorajn bildojn, tie, grandegaj timo kaj sufero enloĝiĝas.

En tiaj lokoj, altiraj leĝoj efikas evidentaj kaj simplaj.

En la mondo, oni vidas multajn homojn, kiuj, per sia imagpovo, ĉeestas aliajn lokojn. Verdire, ili troviĝas en iu loko, nur laŭ fizika vidpunkto; ilia menso, kun preskaŭ siaj tutaj fortoj, vagadas tre distance.

Post la morto, ne plu sub influo de gravito aganta sur iliaj karnaj korpoj kaj malhelpanta la esprimojn de ilia volo, la animoj ligiĝas al objekto de siaj pasioj.

Jen la kialo de tio, ke ni trovas Spiritojn tre forte ligitajn, per altiraj mensenergioj, unujn al aliaj, en plej mallumaj valoj de pentofara sufero, kie ili elaĉetas la malamon, kiu komplicis ilin en malvirto aŭ krimo. Aliaj Spiritoj persistantaj ĉe rimorso, pro faritaj krimoj, improvize kreas punajn ilojn, kiujn ili supozas meriti.

Malnova enlandano el mia iama loĝregiono trudis pezegajn laborojn al la kampuloj, pli pro ambicio je facila profito ol pro amo al laboro, kaj lasis plenplenajn monkestojn por siaj gefiloj kaj genepoj; sed, transiĝinte al spirita sfero kaj aŭdinte la gran-

dnombrajn voĉojn, kiuj akuzis lin, lia pento fariĝis tiel granda kaj lia rimorso tiel viva, ke li mense kreis al si mem grandegan ŝovelilon, kiun li alligis al siaj manoj. Longajn jarojn, li laboris kune kun primitivaj spiritoj, kio efikis kiel puno, kaj lernigis al li la amaran prezon pro trouzo de aŭtoritateco. Fiera sinjorino, kun kiu mi persone konatiĝis, respondecis, danke al kalumnio, pri la morto de virta virino el simpla kaj honesta familio. Elkarniĝinte kaj rekoninte la senmezuran malbonon faritan, ŝi prenis sur sin la suferojn de sia viktimo danke al profunda rimorso, en kiun ŝi ĵetis sin, kaj, dum pli ol jardeko, ŝi restis sub nepriskribeblaj turmentoj.

La mensa materio, energio, kies ekzistadon ni apenaŭ ekkomprenas, obeas la direkton donitan de nia konscienco pli, ol ni konscias.

Vere, paco estas proprajo de tiuj ĝin posedantaj en sia sino.

Peko devenas de niaj konscienco kaj respondeco antaŭ la Leĝo.

Kulpo kaj merito kreskas laŭmezure, kiel distingivo disvolviĝas.

La famaj suferoj de Tantalo, legenda reĝo fariĝinta malsata kaj soifa post sia morto, ne estas iaj mitologiaj simboloj. Ekzistas mensaj fortoj, pri kiuj ni apenaŭ aŭdis, starigantaj certajn anims-

tatojn, kiuj daŭras, ne malofte, jardekojn aŭ jarcentojn.

Krimuloj katenitaj de hororaj bildoj de ili pentritaj en sia mensa vivo; perfiduloj kun fiksa penso al lokoj, kie ili, la lastan fojon, vidis siajn viktimojn; kalumniantoj paralizitaj antaŭ la delikto de ili farita, kaj tuta amaso de estuloj retenantaj bedaŭrindajn rememorojn kiel restaĵojn en sia konscienco bezonas multajn jarojn en procezo, kiun ni povas nomi "interna dekantado de malhelaj kaj krudaj emocioj".

Multaj el tiuj estuloj elirintaj el la fizika korpo restas ĉe sia iama hejmo, kie ili alkateniĝas al larmoj, frenezeco aŭ pensoj pri amareco kaj ribelo, malĝojo aŭ sendisciplino, de tiuj kun ili kunvivintaj. Ili nutras sin reciproke, nature kiel vampiroj, en la hejma medio.

Efektive, neniu vivas en Ĉielo aŭ Infero, sed ja en la sino de sia propra animo, kun tiuj vivaj bildoj, kiujn ili starigis mem en sia mensa mondo.

La spirita korpo estas ankoraŭ tiel nekonata de la ordinara scienco, kiel nia rafinita kulturo, nuntempe atinginta altan nivelon estas, nekonata de la primitiva homo alligita al tribaj moroj.

Morto situigas nin antaŭ kompleksaj demandoj koncernantaj la ampleksan kampon mensan, kaj, por solvi problemojn en tiu kampeo enhavanta multnombrajn du-

bojn, kies graveco ne permesas prokraston, ni devas rekoni, ke, nur per agado laŭ la instruoj de Jesuo, ni trovos la subliman kondiĉon necesan al plej intima ekvilibro, kiun ni bezonas por atingi pli altajn flugojn en scio kaj virto, bazaj elementoj necesaj al pli gravaj faroj en tio, kio koncernas la spiritan vivon.

Multaj el la miloj da homoj, kiuj elkarniĝas horon post horo, sur nia planedo, restas sinsekvajn jarojn apud siaj parencoj, ĉar, el la hejma kunvivado, devenas la plejparto de niaj neplenumitaj devoj.

En la kadroj de nia familia grupo, ne malofte, ni trovas gravajn kontraŭulojn el nia pasinteco. Obstinaj animoj koncerne nekompreneblon, krudecon, nedankemon kaj senpravan agresemon, retroviĝas kiel familianoj partoprenantaj nian ĉiutagan vivon, nun ŝanĝiĝintaj en niajn plej amatajn.

Multaj animoj misharmoniaj inter si povas nun kunvivi kiel gedzoj, gefiloj aŭ gefratoj. Ha! Se ni konscius, dum ni estas en tiu ĉi malmultrimedia ekzistado en la mondo, la grandan valoron de spontane malavara kaj edifa bonfaro favoranta niajn malamikojn el nia pasinteco, certe ni profitus ĉiujn favorajn okazojn por frata interrilato, kiel rekomendis la Majstro.

Ĝuste en la sino de nia familio, ni estas tentataj cedi al pli longaj

disputoj, pli enradikiĝinta ĵaluzo, pli persista ribelemo kaj pli profundaj antipatioj.

Ĉiam facile estos senkulpigi ofendojn venintajn de la mondo, forgesi klaĉadon de tiuj nekonantaj nin kaj pardoni ŝtonĵetojn fari-tajn de la socia kirlo; sed, hejme, kiam ni kunvivas kun tiuj, kies vi-vo interplektiĝas kun la nia, kaj fluas laŭ la sinsekvo de niaj tagoj, la esprimado de nia kapablo spirite ami fariĝas multe pli malfacila.

Jen do la kialo de tio, ke post la morto, konstatinte la gravecon mense harmoniiĝi kun kelkaj el niaj familianoj, ni volonte dediĉas nin ne nur al korektado de misaj agoj faritaj dum nia vivo, kiun morto ĉesigis, sed ankaŭ al helpo de tiuj, kiujn ni malkaŝe abomenis, por ke ili ne ĵetu sur nin dor-nojn de detrua malŝato.

Semado de simpatio estas nepra kondiĉo, al kiu ni submetiĝas favore al nia paco.

Ĉiuj devoj plenumitaj ĉe la sino de nia hejmo permesas akiri rajton komenci sindonan agadon celantan al homa elaĉeto.

Malmultaj viroj kaj virinoj elirintaj el la mondo kun trankvila konscienco koncerne familiajn kaj parencajn interrilatojn rajtas partopreni pli kompleksajn misi-ojn celantajn helpi la homaron.

Ekzistas aliaj Spiritoj, kiuj ne sole ne plenumis la devojn kon-

cernantajn ilin, ĉe sia samsanga familio, sed eĉ devojiĝis en bedaŭrindajn deliktojn; tamen, se ili vekiĝas laŭ fruktodona pento, ili estas invitataj helpi krimulojn, ĉe kiuj ili trovas grandvaloran oportunon esti utilaj.

Tial ni vidas, en penigaj labo-roj, multajn elkarniĝintajn mal-bonfarantojn, kiuj klopodas helpi deliktintojn konfesintajn siajn krimojn, kaj penas ilin forpreni de pereigaj aventuroj, por ilin konduki al honesta laboro; ni vidis murdintojn, kies rimorso instigis ilin al klopodo ŝanĝi nigrajn pensojn de spiritoj devojiĝintaj pro ribelo aŭ malobeo, kio nuligis krimojn jam planitajn; ni ankaŭ observis virinojn, kiuj, en alia tempo, estis logitaj de frivolaĵoj, kaj nun klopodas helpi virinajn korojn, ĉe la bordo de grandegaj abismoj moralaj...

Tiuj improvizitaj batalantoj ne agas ekskluzive ĉe karnaj rondoj, sed ankaŭ ĉe tiuj proksimaj de la surtera vivo, kie ili konsolas suferantajn animojn, aŭ mildigas tur-mentojn akiritajn en tenebraj fluoj de malbono. Spiritoj ankoraŭ neakordiĝintaj kun bono, sed jam inklinaj al ĝi, etendas siajn fortajn brakojn al la idoj de krudeco kaj sufero aperte elmontrantaj per-versecon, kio lernigas ilin uzi la lumajn armilojn de amo kaj humileco, tute nekonatajn de ili. Multaj

homoj, kiuj interesiĝas pri sia morala progreso, ĉar ili jam komprenas la gravecon de spirita pliboniĝo, dediĉas sin, trans la morto, al honorigaj laboroj, en kiuj ili abnegacias sin mem favore al animoj falintaj en fiajn sentojn, kaj tial sukcesas trovi grandvalorajn oportunojn agi favore al sia propra reĝustiĝo.

Absoluta defalo spirita ne ekzistas. Defalo ekzistas nur koncerne nian emocian kampon, kaj la sekvo de tiu defalo estas portempa perdo de kapablo pli vaste observi kaj esti feliĉa.

Por supreniro, nepras reĝustiĝoj, kaj, se fasko da bonvolo, eĉ se ĝi apenaŭ briletas, ekestas en la sino de la Spirito kredanta sin defalinta, tuj stariĝas nemalhaveblaj ebloj al regeneriĝo.

Tiu sin ĵetinta en malbonon kaj rifuzinta leviĝi, dufoje eraras, ĉar senfareco dum reĝustiĝo, ne malofte, estas peko pli granda, ol la farita ofendo.

Nia kerna demando koncerne konsciencan kuŝas en tio, ke ni paciĝu kun ĉiuj, kaj al ĉiuj ni servu, por ke ni pligrandiĝu antaŭ la Eterna Vivo; vekiginte al simila realaĵo, la signifo de niaj spertoj ŝanĝiĝas en ni mem, en la plej esencajn fundamentojn de nia vivo.

Kiam ni rememoras, ke estas daŭra leĝo funkcianta en la plej profundaj tavoloj de nia spirita

korpo, kaj, laŭ la principoj de tiu leĝo, ni korektas niajn erarojn, dum ni travivas spertojn en la korpo, per vipoj de disciplino kaj korektaj rimedoj kontraŭ niaj propraj kapricoj, simpla agado bonfara, al kiu ni dediĉas iom de nia tempo, estas, laŭ la sama leĝo, rekompencata, kaj la Dia Kompato, per mil malsamaj manieroj, kombiniĝas favore al ni, kun la akurateco de la leĝo. Atinginte tian spiritan kondiĉon, ni konstatas, ke eĉ plej sensignifa penso daŭre direktita al bono estigas ĝojon kaj benojn laŭ nekalkulebla multobligo, kiel okazas, kiam, el unu sola semo, devenas protekta arbo, kies fruktoj estas disdonataj dum nedifinita tempo.

Se, trans la morto, nia menso troviĝas en stato pli matura kaj kvintesenca, en kiu ĉiuj valoroj akiritaj dum la homa ekzistado estas alkolektitaj al nia eterna individueco, tiam ni estas nature kondukitaj de sindediĉaj gvidantoj spiritaj, al centroj de avangarda kulturo, kie perfektigiĝas nia menso kaj koro, ĉe novaj rondoj de nobla agado, kie materio ekzistas, kaj manifestiĝas laŭ sublimaj tipoj kaj plej subtilaj elmontroj.

Por ke tio efektiviĝu, nepras, ke niaj fortoj kaj inklinoj sin direktu al Supera Vivo, kun forgeso de ĉio signifanta ekskluzivecon tra nia vivo.

La animo, en tia pozicio, ne plu interesigās pri aferoj de la surtera vivo, eĉ tiuj tuŝantaj korinklinojn, en niaj personaj interrilatoj; ĝi flugos en lumon de vera amo, sed, nun, laŭ atmosfero de granda komprenemo koncerne amatajn animojn restantajn ankoraŭ en malsupera pozicio sur Tero. Ĝiaj plej ardaĵaj pasioj ŝanĝiĝas dum la spirita pliboniĝo, kaj personaj kapricoj transformiĝas en humanajn celojn ligitajn al komuna progreso.

Kaŭze de tio, ĉar la animo jam elkore ligiĝas al ĉies ĝojo, kvazaŭ tiu estas ĝia propra ĝojo, sen artifikoj kaj peno, ĝi sin kapabligas vivi en vera harmonio, kune kun vasta grupo da Spiritoj, kies ideoj, sentoj kaj manifestiĝoj afinas inter si.

La animo vivas en sia komunumo kaj produktas kun ĝi, sen konsidero pri apartaj avantaĝoj, kiel abelo donanta la frukton de sia laboro al abelujo, kiu ricevas ĝian mielon por ĉies posedaĵo. Tamen la abelo plu tenas sian individuecon kaj siajn valorojn en komunaj kadroj de agado kaj merito.

Tial ni vidas grupojn da laboristoj el pli altaj sferoj, en respektindaj entreprenoj kaj servoj ĉe diversaj kampoj de scienco kaj arto; simila vivo, en kolektiva agado, fariĝis realaĵo nur pro tio, ke ili mense liberigis sin.

En tiuj grupoj, regas aliaj principoj regulantaj vivon en familio. Tiuj principoj enhavas mirindaĵojn de moralo kaj beleco, kiujn la spirite mallarĝaj rondoj homaj ankoraŭ longe atendas por kompreni.

De tiaj grupoj konsistantaj el genioj de bono kaj laboro, harmonio kaj saĝeco, misiistoj direktas sin al aliaj mondoj; tiuj misiistoj estas fakuloj interesiĝantaj pri nia surtera sfero.

Jupitero, Saturno, Marso kaj aliaj grandegaj planedoj irantaj al perfekteco en nia sunsistemo estas ofte vizitataj de tiuj avangardoj de lumo kaj amo por interŝanĝi valorojn necesajn al nia pligrandiĝo; ne malofte, tiuj avangardoj enkarniĝas en nia planedo por plenumi grandvalorajn misi-ojn, ĉe kadroj politika, administra, scienca kaj religia, kio postlasas al homaro lumajn signojn neforviŝeblajn, per ekzemploj kaj atestoj, kiujn ili transdonas al junaj generacioj.

Sed, rimarkiginte tie ĉi la venkintojn, ni ne rajtas forgesi la animojn irantajn al la spirita sfero ne plene triumfintajn ĉe la kadroj, en kiuj ili laboris.

Ne ĉiuj eliras el Tero kiel herooj.

Perfekta gloriĝo estas efektiviĝo postulanta senfinajn jarcentojn.

Ĉie troviĝas viroj kaj virinoj karakterizitaj de vera bonvolo

rilate la diajn veraĵojn, tamen ili ankoraŭ ne kapablas praktike apliki tiujn veraĵojn, tuje aŭ entute, al propra vivo.

Ni observas kunulojn jam sukcesintajn liberigi sin de la sufokaj ligiloj de ambicio al mono kaj vivantaj laŭ laŭdinda indiferenteco koncerne materian riĉecon. Ili, tamen, alkroĉas sin al seksaj problemoj, kvazaŭ ili estus nekapablaj rompi la katenojn ligantajn ilin al tiu kampo; aliaj, jam tute serenaj, estingis en sia animo la lastajn spurojn de siaj ardaĵoj karnaj, sed gluiĝas al kelkaj groŝoj, kio ŝanĝas ilian vivon en bedaŭrindan kulton al oro baldaŭ postulota de grundo. Multaj instruas bonon per belaj kaj esprimriĉaj vortoj, sed iliaj sinteno kaj faroj, malgraŭ la respektindaj intencoj ilin instigantaj, elmontras ilian nekapablon regi siajn proprajn pensojn, kio detruas, kaŭze de ilia impulsiĝemo, la bonfarojn starigitajn de iliaj propraj manoj. Multaj bonfaras nur al tiuj, kun kiuj ili simpatias, sed rifuzas helpi tiujn ne partoprenantajn iliajn privatajn rondojn. Ne malmultaj konsoliĝas de religiaj instruoj sanktigantaj ilian intiman kampon; ili, tamen, ne utiligas tiajn instruojn por bonfari en la surtera kampo. Aliaj, favore al homaro, toleras akrajn laborojn, sed, kel-

kajn jarojn poste, retiriĝas en longa ripozo.

Plej altaj sferoj observas ĉiun el niaj grandaj aŭ malgrandaj faroj, ĉar, laŭ la Leĝo, eĉ la plej etaj semoj de nia mensa vivo devas frukti siatempe.

Malnova konato inter miaj amikoj, en bedaŭrinda momento de frenezeco, mortigis sian kunulon, kaj, malgraŭ tio, ke la homa justico ne sukcesis pruvi lian kulpon, kio garantiis lian liberecon, li spertis longan periodon de konscienci-proĉo, kio faris lin, dum pli ol kvardek jaroj, dediĉi sin al karitato, favore al proksimulo.

Per simila agado, li konkeris respekton kaj simpatian de multaj spiritaj bonfarantoj el Supera Sfero, kiuj diligente lin akceptis tuj post lia elkarniĝo, kaj lin kondukis en respektindan lokon, por ke li daŭrigu sian reĝustigan agadon. Per ligoj de amikeco kaj kunlaborado, kiujn li bone teksis ĉirkaŭ sia koro, por solvi sian problemon, li sukcesis iri renkonte al sia viktimo, kies ribelo tiun ĉi faligis en profundegaĵon de mallumo kaj brutaleco. Li ne tuj konigis sin al sia viktimo, por ke tiu ne turmentu, kio helpis la iaman viktimon senti simpatian necesan al ricevado de la bonfaroj alportitaj de lia malnova murdinto. Post intensa batalo por morala altiĝo favora al

lia mensa liberiĝo, li, la murdinto, denove reenkarneĝos por ricevi sian viktimon kiel amema patro.

Forpreninte de sia frato la okazon vivi kaj batali ĉe la surtera kampo, li redonos al sia viktimo ties forprenitan korpon, kaj helpos lin edukiĝi inter benoj de komuna ekzistado.

Reveninte en la materian vivon, ili kune spertos malnovajn antipatiojn troviĝantajn en ilia pasinteco, sed la regeneriĝinta murdinto konkeris, per siaj propraj meritoj, la benon esti patro, kaj, en tiu kondiĉo, ni prave devas esperi, ke li venkos, ĉar, kiel patro, li sentos la subliman ĝojon doni sin mem.

Kiam grandaj malamikoj prenas decidon kunvivi per samsanga parenceco, grandvalora merito jam signis ilian evoluan vojon, ĉar, sub la sama tegmento, akceptinte la postulojn de vera amo, ili povas solidigi la fundamentojn de perfekta unuiĝo.

Kiu konkeris kapablon helpi sen postuli reciprokecon, tiu ekiris sur vojo de efektiva aliro al Supera Sfero.

La pasia krimo farita de tiu amiko de mi menciita ne signifis por li senfinan suferadon, laŭ la instruoj de la malnova teologio de Kristanismo, sed kostis al li grandegajn dolorojn favorajn al lia

reĝustiĝo, kun enorma tempelspezo, ĉar, se li paciencie tolerus sian kontraŭulon, ne estus necese tiom longaj penoj elaçeti sian krimon.

Mi ankaŭ rememoras pri malnova terposedanto havanta multajn subulojn sub sia respondeco, de kiuj li postulis pasivan obeadon; sed, samtempe, malgraŭ lia postulema karaktero, li multon faris favore al la loko, kiu vidis lin naskiĝi.

Li prilaboris la teron kaj donis al novaj generacioj rudimentan instruadon, kio rezultigis multajn avantaĝojn al multnombraj animoj. Tio altiris simpatian de multaj bonfarantoj el la Spirita Mondo; sed li estis tre kruela al la homoj de li taksataj kiel malsuperaj. Li, per la aŭtoritato, kiun li disponis, komencis bedaŭrindan punsistemon kontraŭ tiuj laboristoj, kiujn li konsideris neglektemaj. Per tia domaĝa dispono, kelkaj laboristoj rapide fariĝis malsanaj je la pulmoj kaj mortis pro fatala tuberkulozo. Ricevinte lian inviton, morto vizitis liajn terojn kaj falĉis multajn laboristojn, kio malhelpis diversajn programojn venintajn el Altaj Sferoj cele al es-tontaj bonfaroj. Veninte en la spiritan mondon, li estis tuŝita de dolora rimorso; tamen, se li eraris, kiam li troe punis malriĉajn

**Kiu konkeris
kapablon helpi sen
postuli reciprokecon,
tiu ekiris sur vojo de
efektiva aliro al
Supera Sfero.**

homojn de li nesufiĉe helpitajn kaj edukitajn, li fakte kunlaboris favore al pli taŭgaj vivkondiĉoj, ĉe sia naskiĝurbo. Li faris, kion li kapablis laŭ siaj moralaj ebloj, por komuna progreso.

Liaj noblaj kvalitoj pli pezis, ol liaj neperfektecoj, kaj la Supera Sfero koncedis al li gravan reenkar-niĝon, en kiu li ricevos diplomon pri medicino, per kiu la malnova terposedanto rajtos dediĉi sian vivon al kuracado de malsanuloj, kaj, pli specife, al studado de ftizo, kio ne nur favoros lin helpi aliajn, sed ankaŭ mildigos lian konscienciproĉon.

Vivo estas sankta ĉeno el perfektaj elementoj, kiu etendiĝas de la subatoma kampo ĝis Dio, kaj, ĉiufoje, kiam ni, obstinaj aŭ senatentaj, disrompas ĝian harmonion, tio rezultas en uzo de forto, kapablo kaj tempo, por nia reĝustiĝo.

Laŭmezure kiel ni disvolviĝas laŭ saĝeco kaj amo, ni pli kaj pli konvinkiĝas, ke perdo de minuto estas la plej ruiniga kaj bedaŭrinda el ĉiuj perdoj.

Dolora estas spirita stagno por tiu vekiginta en plena vojirado, kaj, se kompreni, ke respondecu iras paralele kun akiro de scio, la reĝustiga laboro ne ĉiam estas facila aŭ tuj alirebla.

Neniu supozu, tamen, ke li estas forigita aŭ forgesita, nek kredu, ke morto de fizika korpo estas definitiva solvo de problemoj de la animo.

Ni daŭre lernas kaj progresas

trans la malkomponiĝo de nia karna korpo.

Ĉie kaj ĉiel ni estas en la Eterneco.

Ni rikoltas, en ĉiu tago, la fruktojn kaj emociojn de tio, kion ni estas vere semintaj.

La sola malfeliĉo partoprenanta en nia vivo estas tiu, kiun ni proponas al ni mem.

Situacioj en la mondo estas elprovoj aŭ premioj, elaĉetoj aŭ spertoj.

Ĉiu el ni havas meritojn, sed ankaŭ ŝuldojn, laŭ nobligaj kvalitoj kaj domaĝaj malvirtoj analizeblaj en la bilanco de nia persona konto.

Trans la tombo, kie la karna envolvaĵo forlasita estas konsiderata simpla restaĵo, el kiu revenas la senmorta spirito, ekzistas organizoj, en kiuj la animo, kiam agordita al la Naturaj Leĝoj de Progreso, trovas etoson taŭgan al pligrandigo de siaj amaj aspiroj kaj studoj.

Prilumitaj hejmoj, benataj nestoj de unuiĝo, atendas tiujn estimantajn sin reciproke kaj grupiĝintajn laŭ samaj interesoj.

Nia planedo estas granda tuto, kie arbaroj, oceanoj kaj dezertoj havas kelkajn nukleojn de civilizita homa inteligenteco – nemultajn kompare kun la vasteco de la tersurfaco. Simile, la regiono, kiun ni nomas "spaco", en la ĉirkaŭaĵo de Tero, estas viva aro enhavanta koloniojn por evoluiga agado, regenerajn laborgrupojn kaj mirindajn urbojn, kie la spirito de bona volo kaj scienco trovas larĝajn horizontojn favorajn al feliĉo kaj esploro, pliperfektigo kaj progreso.

Ju pli purigitaj konscienco kaj koro, des pli de la dia lumo la estulo kapablos speguli.

Antaŭ frato iranta vojon, kies spertoj estas de ni nekonataj, ni silentu, kiam ni ne kapablas efektive lin helpi per kuraĝigaj esprimoj, kun la certeco, ke vivo estas senfina, kaj animo, senmorta. ■

KELKAJ PERSONAJ OKAZINTAĴOJ

Artikolo de Chr. Lyngs, aperinta en *Kunlaborada verketaro*, de Esperanta Psikistaro, ĉi tie retajpita laŭ la 2a eldono, 1911, p. 72-75. "Tradukis F-ino Astrid Rasmussen, Vicinspektorino".

Ĉi-foje ni ne povas multon diri enkonduke. Nia esploro apenaŭ prosperis. Pri la aŭtoro ni scias nur tion, kio legeblas en la verko mem: "instruisto ĉe popola lernejo", prezidanto de "Dansk Metapsykisk Selskab", Kopenhago, Danio.

Pri kiu "popola lernejo" temas? Kie? Same pri la tradukinto. Ŝi tradukis el kiu lingvo? Kion

ŝi vicinspektoras... kie? Kiu estas ŝi entute? Nu, ni esperu respondi ĉion ĉi estontece.

La nuna artikolo estas ie kaj ie redaktita. Ĝuu ĉi tiun kaj aliajn felietonajn verkaĵojn el la pasintaj numeroj de la revuo!

KELKAJ PERSONAJ OKAZINTAĴOJ

Por tiu kiu eĉ ne posedas median kapablon estas sufiĉe malfacile kompreni kaj prijuĝi mediumajn fenomenojn. Almenaŭ mi tion speris. De la unua tempo, kiam mi komencis okupi min je ĉi tiuj aferoj, ĉiam estis insistate de spirita flanko, ke mi estas sen iu ajn mediuma naturkapablo, kaj ke mi pro tio ĝoju, ĉar mi ĝuste per tio, laŭ persona, sobra meditado, estas kapabla juĝi tion, kio okazos.

Sed tamen mi havis tiun ĝojon, kaj mi devas aldoni: tiun grandan favoron kaj profiton, travivi tutan apartan serion da mediumaj fenomenoj, supozeble por ke mi ricevu pli klaran komprenon pri la limoj inter la materiaj kaj la spiritaĵoj sentimpreso, inter propra konscia enhavo kaj spiritaĵoj informoj. El ĉi tiuj travivaĵoj mi ĉi tie rakontos kelkajn.

La unua okazintaĵo de l' priparolita speco estis okazo de *Clairaudience* (klar-aŭdado)¹. Mi staris sur la strato atendante tramveturilon, kiam mi aŭdas voĉon kiu diras: "Reiru!" Samtempe mi estis informata, ke estas neutile forveturi, kaj pri kio mi anstataŭe devos fari, kaj kiu li estis kiu parolas. Ke estas neutile forveturi, povus deveni de mi. Sed tion, kion mi devus fari, mi absolute konsideris neebla. Sed ĉiam pli forte mi aŭdis la vorton: "Reiru!" Kaj nun mi atentis, ke la vortoj klare atingis mian konscion tra mia maldekstra orelo (mia dekstra orelo estis tute surda), tiel ke mi estis tentata min turni por vidi la parolanton; sekve mi tion aŭdis fizike, dum la vortoj konstante estis sekvataj de longa ideasocio, kiu vere trarapidegis mian cerbon, sed tamen ne devenis de mi mem, ĉar mi plej fervore diskutadis kun ili per miaj propraj pensoj. Daŭris longe antaŭ ol la tramveturilo alvenis, tiel ke mi havis bonegan okazon observi la fenomenon, kiu, cetere, estis por mi malagrablega, ĉar ĝuste al mi urĝis. Mi tamen forveturis, sed baldaŭ revenis sen rezultato. Mi ne intencis fari tion, kio estis dirita, ĉar mi tion konsideris neebla kaj danĝera. Sed tiam mi ree aŭdis la voĉon: "Komencu!" Nun mia cerbo estis malplena je pensoj, mia konscio nur enhavis tiun solon: "Estas neeble; mi ne kuraĝas." Sed pli kaj pli forte la voĉo sonadis: "Komencu!" Tiam mi obeis. Kaj certe neniam io sukcesis al mi tiel bone kiel

"Reiru!" Nun mia cerbo estis malplena je pensoj. (...) "Estas neeble; mi ne kuraĝas". Sed pli kaj pli forte la voĉo sonadis: "Komencu!"

ĉi tio kaj eĉ malgraŭ ĉia homa kalkulado. Kaj samtempe tio estis *por mi* la pruvo de persona okazintaĵo, kaj de materia kaj de spirita *Clairaudience*.

Ankaŭ kelkajn ekzemplojn de *Clairvoyance* (klarvidado)² mi travivis. Du fojojn mi tute klare vidis la homan aŭron³. Je la unua, mi ĝin vidis ĉirkaŭ du diferencaj personoj, kiuj, unu post la alia, staris sur la sama loko; klare kaj en hela taglumo mi observis la diversajn individuajn karakterojn de l' aŭro. Ĉe unu, larĝa, eksteren proporcie malpliĝanta, de l' ŝultroj supren formante super la kapo rondigitan konuson. Ĉe la alia iomete pli mallarĝa, sed fortege brilanta plej proksime de la korpo kaj tute sekvante ties konturojn, ĉirkaŭ la kapo, kontraŭ la kolo kaj ĉirkaŭ la ŝultroj. Alian fojon, antaŭtagmeze, en mia klaso en la lernejo, tute neatendite mi vidis la aŭron ĉirkaŭ tri el miaj lernantoj, kiuj sidis en diversaj lokoj de la ĉambro. Ĉe ambaŭ okazintaĵoj mi observis la fenomenon dum kelkaj minutoj kaj mi aliloken rigardis fojon post fojo, sed tamen ĝi ne malaperis.

Dum longa tempo mi laŭ admono de l' spirita flanko estis sidanta regule por *aŭtomata skribado*⁴, sed nur kelkfoje mi atingis rezultatojn certigantajn al mi. Kontraŭe okazis al mi tiel karak-


terizaj ekzemploj de *inspirita*⁵ *skribado kaj parolado*, ke mi tute ne kuraĝas tion atribui al mia propra konscia enhavo.

Fine, mi rakontos okazintaĵon kiu, por mi, estis la plej konvinkanta pri la influado de l' spiritaj inteligentuloj al la materia mondo.

La 27an de majo 1908, mi vekiĝis kaj vidis, ke estas la 5h30; ne pensante ion ajn mi ree ekdormis, kaj tiam mi vidis leteron, kiu estis tenata antaŭ mi per du manoj, leteron kiun mi legis diversfoje, dum mi tute malrapide vekiĝis, ĝis mi, je la sesa horo, estis tiel maldorma, ke mi leviĝis, kaj, ĉe mia skribtablo, mi ekkopiis ĝin. Mi ankoraŭ estis kapabla vidi la leteron antaŭ mi. Tamen, la unuaj vortoj de ĝia titolo estis necertaj. Iom post iom, dum la skribado progresis, la letero malaperis kaj fine restis nur la subskribo, beleaga kaj karakteriza "A". Kaj ĉi tiu "A" staris tiel klare, ke ankoraŭ mi estas kapabla ĝin vidi, nun tamen ne per mia materia vido. Sed tiam ŝajnis al mi, ke materie mi vidis la leteron, kvankam aliaj objektoj antaŭ mi estis videblaj tra ĝi. La okazintaĵon mi sekretiĝis, kaj zorgeme mi kaŝis la raporton en la plej interna fako de mia paperujo. La raporto mem estis de grandega valoro por la kunsida laboro de nia rondo. Nur

la subskribon mi ne konis. Post dek kvar tagoj, la informo estis certigata, kaj mi tiam diris, ke dum dek kvar tagoj mi ĝin bone sciis, kaj mallonge mi rakontis pri la letero, kiun mi estis vidinta. Tiam ĉeestanta mediumino subite estis ekkaptata de forta reĝo je la brako, kaj nun per skribado virina spirito, nome Alvilda, la gvidulino de l' mediumo, sciigis, ke, dum tiu nokto, mi estis liberigita, kaj en la astralsfero mi estis estinta kune kun ili, kaj dum tiu kunveno mi diskutadis diversajn cirkonstancojn rilate al la laboro. Sed fine mi estis deklarinta, ke ĉio estas neutila, ĉar mi ja ne es-

tos kapabla memori ion, kiam mi la venontan tagon ree estos en la tersfero. Tiam ili estis promesintaj al mi, ke ili ĉi tiun fojon volis prizorgi, ke mi la plej gravan memoru. Ĉi tion ŝi do faris per tiu speciala maniero. Kaj por atesti la verecon, ŝi, sub fortega materia reĝo, skribis "A", precize kiel mi ĝin vidis en la letero, kaj kiel la mediumo neniam skribis ĝin aŭ estus kapabla ekspensi ĝin skribi. Nun mi montris mian skribitan raporton kaj prezentis ĝin al la ĉeestantoj, kiuj kun plej granda miro, konstatis, ke la "A" sur ambaŭ lokoj estis precize la sama. ■



Senpaga elŝuto
de la verko.



1. Vidi *La libron de la mediumoj*, ĉap. 14, §165, *Aŭdivaj mediumoj*.
2. Vidi *La libron de la mediumoj*, ĉap. 14, §167, *Vidivaj mediumoj*.
3. Originale "Aura", sed en PIV jam estas la vorto "aŭro".
4. Vidi *La libron de la mediumoj*, ĉap. 14, §179, *Mekanikaj mediumoj*.
5. Vidi *La libron de la mediumoj*, ĉap. 14, §182, *Inspirataj mediumoj*.

EVENTOJ



10a Tutamerika Kongreso de Esperanto
14a Spiritisma Esperanto-Renkontiĝo (SER)
4a Monda CONCAFRAS



Aliĝu tuj al la ĉi-jara

X Tutamerika Kongreso de Esperanto

2-a ĝis la 5-a de novembro 2023
Fortalezo/CE • Brazilo

esperanto.org.br/kongreso



Universala
Esperanto-
Asocio



Brazila
Esperanto-
Ligo



Brazila
Esperantista
Junulara
Organizo



Cearaa
Esperanto-
Asocio

KIAL MI SUFERAS?

La malbono kaj ties forigilo

14aSER
Spiritisma Esperanto-Renkontiĝo

La 14an de aprilo 2024

konsolanto.org/ser

Virtuala evento



JARA EVENTO DE SEA

Pliaj informoj aperos komence de 2024 sur la indikita retpaĝo. Anticipe ni informas, ke partopreno estas tute senpaga. Fizika evento okazos nur en 2025, kaj en la venontjara virtuala Renkontiĝo SEA certe havos novaĵojn pri ĝi.

4a Concafrás Mundial

Luanda - Angola
11 a 14 de julho 2024

Tema: Paz e transformação social no mundo

ÁFRICA
O Berço da Humanidade

concafrasmundial.com



4a Monda CONCAFRAS: Teoria-praktika spiritisma evento kies ĉeftemo ĉi-foje estas Paco kaj Transformo de la Mondo. De la 11a ĝis la 14a de julio, en Luando, ĉefurbo de Angolo, Afriko.

ANONCOJ



Kvindek-jariĝo de Bahaa Esperanto-Ligo (BEL)
Legio de Bona Volo lanĉas novan infanlibron en Esperanto
La libro de la spiritoj nun en aparta retejo
Nova eldono de la vortaro Allan Kardec Afonso Costa
Eldonejo Lorenz havas novan, propran sidejon



Raportis Bernhard Westerhoff | bel@bahai.de

La 19a de marto 2023 markas la 50an datrevenon de la fondo de Bahaa Esperanto-Ligo.

La starigon de BEL iniciatis grupeto de bahaanoj kolektiĝintaj ĉe la UK 1972 en Portland, Usono. Ili submetis tiucelan proponon al la Universala Domo de Justeco, la supera internacia gvidorgano de la Bahaa Kredo, kiu en marto 1973 donis sian oficialan aprobon. De tiam BEL kunordigas la kunlaboron inter la bahaaj komunumoj kaj

la Esperanto-movado. La Ligo iom post iom kreis por si firman fundamenton, solide disvolviĝadis kaj tra la duonjarcento povis fieri pri kelkaj gravaj atingoj. Tiel BEL dekomence eldonas, nun jam de multaj jaroj regule dufoje jare, membrotulenojn *La BELmonda letero* flegas informriĉan retejon (bel.bahai.de), regule reprezentas la Kredon ĉe UKoj kaj aliaj gravaj Esperanto-eventoj, averaĝe ĉiujare eldonas ion pri la Kredo en Es-

peranto kaj dum la lastaj jaroj ankaŭ subtitoligis kvar unuhorajn filmojn pri la centraj personecoj, celoj kaj disvolviĝo de la Kredo (vidu la retejon sub “literaturo” kaj bel.bahai.de/4filmoj), informas la bahaan komunumon pri la evoluo de Esperanto, aranĝas ĉiumonatajn virtualajn membrokunvenojn ktp. Nuntempe en la Ligo, kiu jam de 1975 oficiale estas kunlaboranta faka asocio de UEA, membras iom pli ol 200 anoj, kiuj vivas en pli ol 50 landoj.

La Universala Domo de Justeco sendigis jenan gratulon al BEL:

La Domo de Justeco ĝoje konstatas la daŭran kunagadon de la Ligo kun aliaj, kiuj konsideras komunan lingvon esti kanalo por krei reciprokajn interkompreniĝojn inter la popoloj de la mondo.

Kaj UEA gratulis jenavorte:

Universala Esperanto-Asocio kore gratulas vin kiel longtempa, persista kaj aktiva Faka Asocio (...). Estante unu el la aktivaj Fakaj Asocioj vi estas bone konata de esperantistoj, kaj ni deziras ke BEL plu agadu kaj prezentu sin dum Universalaj kaj Virtualaj Kongresoj de UEA (...). Samtempe ni fidus ke BEL plu agadas por disvastigi la konon pri Esperanto inter aliaj grupoj kaj komunumoj ene de la Bahaa Religio tra la mondo kaj deziras sukceson en tiu aktiveco.

Okaze de sia jubileo, BEL eldonas Esperanto-tradukon de *Dio preterpasas* (God Passes By en la originala angla), la aŭtoritata preskaŭ 500-paĝa historio de la unuaj cent jaroj de la Kredo, verkita de Shoghi Effendi, pranepo de la Fondinto de la Kredo kaj de 1921-1957 ĝia Gardanto. Krome, ĝi planas informi la bahaajn instituciojn pri sia duonjarcenta disvolviĝo, pri la stato de la lingvo Esperanto kaj ĝia movado, kaj tiucele eldonos novan broŝuron anglalingvan kun traduko; kaj ankoraŭ pliaj aktivecoj konsideratas por la jubilea jaro.

La Bahaa Kredo, fondita de Bahá'u'lláh [1817-1892] meze de la 19a jarcento, baziĝas sur la konvinko pri la unueco de Dio, de la religio kaj de la homaro. Ĝi havas inter siaj bazaj principoj la realigon de ĉi tiu unueco per rimedoj inkluzivantaj la adopton de universala helpa lingvo kaj i.a. ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj ties organoj pledas por tiuj principoj. Bahaaĵoj apartenas al preskaŭ ĉiuj etnoj kaj vivas en preskaŭ ĉiuj anguloj de la tero. Ili ĉie tra la mondo strebas krei bazdemokratiajn komunumojn malfermajn por ĉiuj; tiuj formas unikan tutmondan organizaĵon surbaze de la principo de unueco en diverseco kaj tiel modelon de unuigita, paca, prospera tutmonda socio. ■

Legio de Bona Volo eldonas novan infanlibron

Domo sur roko estas parto de la Ekumena Kolekto *La sankta evangelio de Jesuo*, kiu alportas al la Esperanto-infanoj la fratan mesaĝon de la Ekumena Kristo, kune kun belaj, allogaj ilustraĵoj, en ludema kaj amuza maniero.

Tiu ĉi cifereca libro vere kontribuas al la disvolviĝo de universalaj valoroj, kiel respekto, solidareco kaj bonvolemo, preparante infanojn al la defioj de la nuntempo kaj la estonteco. ■

Fonto: adaptita el retletero de LBV.



Elŝutu ĝin senpage
el Guglo-libroj!



La libro de la spiritoj nun en aparta retpaĝaro

Kun permeso de Brazila Spiritisma Federacio kaj danke al la iniciato, redaktado kaj financa subteno de nia duobla samideano Paulo Pires, *La libro de la spiritoj* estas nun legebla surekrane ĉe la jena retadreso: www.spirito.app. ■




Nova vortaro portugala-esperanta

La portugallingva esperantistaro nun havas veran kialon de ĝojo en siaj klopodoj subteni Esperanton kaj ĝiajn idealojn: la reeldono, ĝisdatigita kaj multe ampleksigita, kun 46.000 vortareroj, de *Nova portugala-esperanta vortaro*, de Allan Kardec Afonso Costa. Ekde ĝia lanĉo, en 1987, kiel omaĝo de Brazila Spiritisma Federacio (BSF) al la centjara jubileo de la Internacia

Neŭtrala Lingvo, tiu ĉi altvalora laborilo estas reeldonata. Nun, post 35 jaroj da fruktodona ekzistado, kaj danke al partnera agado de Eldonejo Lorenz kaj BSF, nova eldono de la verko estas havebla. ■

Fonto: adaptita el retletero de Eldonejo Lorenz.



Retbutiko de
Eldonejo Lorenz.



Havebla ankaŭ ĉe BSF: www.febeditora.com.br

Eldonejo Lorenz ekhavis propran sidejon



Fasado de la nova sidejo.


Adreso: Rua Aníbal Bruno, 18 – Lot. Madean, Rio de Janeiro, Brazilo.

Post 47 jaroj, Eldonejo Lorenz akiris propran sidejon. Jen grava atingo, kiu meritas diskonigon. Ĝi estas modesta posedaĵo, kiu bezonas renovigon, kiel montras la aldonitaj fotoj. La Eldonejo invitas ĉiujn partopreni la kampanjon por kolektado kaj aĉetado de konstrumaterialoj.

Eldonejo Lorenz intencas remalfermi sian fizikan librovendejon, krei muzeon, krom disponigi bibliotekon kaj ĉambron al la esperantistaro. Partnere kun la Esperantogrupo *Pac-horo*, Esperanto-lecionoj estos ofertataj en la nova sidejo, kiu

gastigos ankaŭ diversajn sociajn kaj kulturajn agadojn. Ĝi estas la sola eldonejo okupiĝanta ĉefe pri eldono de spiritisma literaturo en Esperanto. Ĝia agado inkluzivas ankaŭ diskonigon de spiritismo kadre de Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj aliaj eventoj.

Por pliaj detaloj pri la projekto, kontaktu la teamon de la Eldonejo. Ĉiu kontribuado gravas. ■



www.editoralorenz.com.br
editora_lorenz@uol.com.br
Vacapo: +55 21 984278080
Instagram: editoralorenz
Facebook: editoralorenz.eldonejolorenz
PIX-šlosilo: 42515452000156 (CNPJ)
UEA-kodo: sesl-s



Statistikoj de Kampanjo Abel Gomes
Blogo de SEA unujariĝis
Nova fonduso por financado de la asocia agado



Associação Brasileira de Esperantistas Espiritistas
www.baes.org.br

Kampanjo Abel Gomes, lanĉita en 2021, daŭre funkcias. Statistike pli sukcesa, en 2023 pluraj librokompletoj jam disdoniĝis. Dum la ĉijara BRES, kadre de aparta programero (p. 31), partoprenantoj helpis pretigi pli ol 40 novajn libropakaĵetojn. Anstataŭ sendi ilin perpoŝte, SEA prioritare ĉeestas eventojn kie deĵoranto povas rekte enmanigi librojn al interesitoj, kiel okazis ĉi-jare dum la 6a Spiritisma Kongreso de Uberlândia, okazinta en januaro, kaj dum la 67a CONCAFRAS-PSE, en februaro. Dum ĉilasta okazaĵo Eldonejo Auta de Souza lanĉis la libron *Letras que ilumi-*

nam (Lumigantaj literoj) – kompilita materialo pri la graveco de spiritismaj libroj. Kelkaj partoprenantoj ricevis po unu ekzempleron de ĝi kaj de librokompleto de Kampanjo Abel Gomes.

Intertempe SEA produktis emblemon por la Kampanjo kaj afiŝegon, kiun volontulo eksponas dum spiritismaj eventoj. Ni menciuj, ke dekoj da novaj libroj estas donacitaj al la stoko. Venontjare novaj kompletoj estos preparitaj.

Se la biblioteko de via spiritisma societo ne disponas pri spiritismaj libroj en Esperanto aŭ lernolibroj de la lingvo, sufiĉas kon-

STATISTIKO



16 kompletoj
ĝis aŭgusto 2023.

5 kompletoj en 2022.



+30 individuoj
el 7 landoj de Ameriko,
Eŭropo kaj Afriko.


takti nian Asocion kaj peti sendon de libropakaĵo. La servo estas senpaga. La sendoj okazas prioritare al organizaĵoj, sed laŭeble SEA sendas senpagajn materialojn ankaŭ al individuoj, ne nur en Brazi-

lo. Se vi volas kontribui al la Kampanjo, ĉu per financaj rimedoj, ĉu per libroj mem, novaj aŭ brokantaj, bonvolu kontakti la Asocion. Antaŭdankon! ■



ELAINEKAPP

Esperantistoj dum la 6a Spiritisma Kongreso de Uberlândia. De maldekstre Isabella Oliveira, Geraldo Campetti, Leandro Abrahão kaj Elaine Kapp.



Libro lanĉita de
Eldonejo Auta de Souza.



Transdono de librokompletoj
dum la 67a CONCAFRAS-PSE.

1-jariĝo de Blogo de SEA

Antaŭ unu jaro lanĉiĝis la blogo de SEA, kie publikiĝas i.a. materialoj, kiujn ni ne povis aldoni al nia revuo. Ekde ĝia inaŭguro ĉiumonate aperis almenaŭ unu teksto. Konstanta kontribuanto estas la duobla samideano Joel do Ó, kies tradukoj de spiritalaj mesaĝoj regule aperas. Menciindas la angulo *Virtuala Muzeo*, en kiu ni afiŝas historiajn kaj unikajn materialojn, kiujn ni uzos por estontaj esploroj.

La blogo estas tute malfermita al nia komunumo, ne nur al membroj de SEA. Se vi ŝatus ion publikigi en ĝi, bonvolu kontakti la Asocion. ■



mallonge.net/blogodesea

Fonduso

José Machado Tosta

En januaro 2023 SEA kreis fonduson je la nomo José Machado Tosta (1873-1929), naskita en Acoroj. Li agadis i.a. ĉe Brazila Spiritisma Federacio (BSF), en Rio-de-Ĵaneiro, kaj forpasis en Brazilo. Pionira Esperanto-spiritisto, Tosta komencis la unuan Esperantokurson ofertitan de BSF, en 1912.

La fonduso celas helpi la Asocion plenumi siajn celojn, kon-

traste kun la ĝenerala kaso, kies monrimedoj estas destinitaj al la administrado de la organizaĵo. Ĉi-jare okazis du sukcesaj mon-kolektoj, kiuj ebligis reeldonon de suplemento al la organo de SEA kaj mendon de dekoj da libroj por Kampanjo Abel Gomes.

Koran dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj! ■



Reeldono de 1000 ekzempleroj de la portugallingva suplemento “Al spiritistoj pri Esperanto”.



Librokompletoj pretigitaj dum la ĉi-jara BRES (p. 31), parte danke al la verkoj akiritaj per la rimedoj el la ĵus kreita Fonduso.



Oni povas donaci ekzemple per la PIX-ŝlosilo de SEA: 12677684000140 (CNPJ). Pri aliaj manieroj donaci, bonvolu kontakti la Asocion, same pri eksterbrazilaj donacoj. Anticipan dankon!

FORPASOJ

“Tien flugas kolombo
liberiĝinte tra l’ spaco.
Pepante ĝi svingas flugilojn
for de l’ tera surfaco.”

Auta de Souza



Francisco Mattos de Oliveira

Brazilano, 1940-2022

Kunfondinto de Asocio Spiritisma Mondo, iama estrarano de Brazila Esperanto-Ligo (BEL) kaj dum multaj jaroj ties libroservisto, Chico enkondukis la devizon “Ni laboru kune”, ĝis nun uzata de BEL. Lia edzino, Ana Koide, nuntempe volontulas ĉe la Ligo.



Giuseppe Grattapaglia

Italo, longe loĝinta en Brazilo, 1931-2023

Dum pli ol 50 jaroj agadis kun sia edzino Ursula favore al la bieno Bona Espero, en Brazilo. Tie ili i.a. zorgis orfajn infanojn, kiuj en Bona Espero lernis ankaŭ Esperanton. La esperantista mondo kondolencis la forpason de tiu kara figuro.



Neide Barros Rêgo

Brazilano, 1938-2022

Elstariĝis kiel deklamisto, instruisto, soprano kaj verkisto. Fondis la Kulturcentron Maria Sabina kaj organizis multajn literaturajn eventojn. Ricevis premiojn pro sia poezio kaj kutime kantis en Esperanto-kongresoj naciaj kaj internaciaj. Membro de pluraj literaturaj akademioj.



José Passini

Brazilano, 1926-2023

Aŭtoro, profesoro kaj iama rektoro de Federacia Universitato de Juiz de Fora (UFJF). Ĉefprelegis dum la 1a Brazila Renkontiĝo de Esperanto-Spiritistoj, en 2006. Prezidis Brazilan Esperanto-Ligon. Doktorigis pri lingvistiko kaj malferme subtenis la Internacian Lingvon dum lekcioj, prelegoj kaj konversacioj. Publikigis la verkon *Bilinguismo: utopia ou solução?* (*Dulingveco: utopio aŭ solvo?*). Pri lia vivo aperis portugallingva biografio, titolita *Do zero ao infinito: a trajetória de um determinado* (*De nul al senfino: vivovojo de rezolutulo*), verkita de Flávia Halfeld.



Maria Garcia Borges

Brazilano, 1928-2023

Emerita instruistino. Kunfondis Esperanto-Societon de Suda Mato-Groso, en 1985, kaj ĝin prezidis (1996-1999). Prezidis ankaŭ la lokan komitaton de la 35a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Campo Grande, en 1999.



Paulo Roberto de Freitas Carvalho

Brazilano, 1948-2022

Konata kiel Paŭlo Kverko. Instruisto, preleganto, membro de pluraj Esperanto-asocioj kaj iama prezidanto de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro (AERĴ).

KOREKTOJ KAJ PRECIZIGOJ

Koncerne la enhavon de la antaŭa numero.

Pri J. Camille Chaigneau

Sur paĝo 28 legeblas, ke Chaigneau “naskiĝis en la 22a de januaro 1849 en Villeneuve-la-Comtesse, Francio” kaj ke la informo pri lia naskiĝurbo “ni trovis en blogo pri la dirita urbo”. La naskiĝdato estas ja en la blogo, sed ne estas informo pri naskiĝloko, kiel ni asertis. Sekve ni ankoraŭ ne povis konfirmi la lokon, kie li naskiĝis.

Sur paĝo 29 legeblas, ke Camille “studis medicinon”, ke “ni ne scias, ĉu li havis kuracistan karieron”, sed malkovris, ke “dum la Alzaca-Lorena milito (1870) li servis kiel ambulancisto”. Ĉi tiu lasta informo troviĝas sur paĝo 28 de *Revue scientifique et morale du spiritisme*, de Gabriel Delanne (jan. 1919) – referenco, kiu mankas al

la artikolo. Intertempe ni trovis alian vorton, kiu pli precize ol “ambulancisto” esprimas lian probable rolon dum la milito (fr: “il fut mobilisé dans les ambulances”): sukuristo.

Sur paĝo 29 legeblas, ke Chaigneau “aŭtoras interalie la poemaron *Les chrysanthèmes de Marie*, kies poemoj estas spiritualismaj”. Sur paĝo 31 de *Revue spirite* (jan. 1919) legeblas, ke li “publikigis” la libron, kaj ke ĝi enhavas mediu-majn komunikaĵojn. La mediumo estas ne Camille, sed alia persono, kies nomon la artikolo ne malkaŝas. Kion precize enhavas la libro ni ne povas diri. Bedaŭre ĝis nun ni ne trovis ekzempleron.

Pri Ismael Gomes Braga

Sur paĝo 26 ni erare skribis la jaron de naskiĝo de Ismael. Ĝi estas 1891, ne 1881, kiel estas skribite. La jaro de forpaso estas ĝusta: 1969.

Pri Gabriel Delanne

Sur paĝo 29 legeblas, ke Camille Chaigneau “komencas kunlabori kun Gabriel Delanne ekde 1883, kiam lanĉiĝis la revuo *Le spiritisme*, kaj ke “Delanne, kiu estis unu el ties kunlaborantoj, baldaŭ fariĝis ĝia ĉefredaktoro”. Ĉi tiu lasta informo estas eltirita el la verko *Gabriel Delanne: vivo kaj apostolado* (3a eldono), tradukita el la franclingva biografia libro verkita de Paul Bodier kaj Henri Regnault (fr: *Une biographie de Gabriel Delanne*). Ni provos, kiel eble, precizigi la rolon de Delanne.

Sur paĝo 39 de la dirita libro, la aŭtoroj malkaŝas, kiel ekestis la gazeto, kaj aldonas, ke al Delanne mem plaĉis rakonti la okazaĵon al proksimuloj.

Iam, en Francio, angla sinjorino, nome Elisabeth d'Espérance (1855-1918), proponis rekte al Delanne, en surprizaj cirkonstancoj, la fondon de spiritisma revuo. Al li ŝi enmanigis sufiĉe grandan monsumon, por la unuaj disponoj kaj – laŭ la rakonto de la biografioj de Gabriel – demandis lin, ĉu li akceptus redakti la revuon. Delanne jesis kaj dankis, kaj ŝi respondis: “Ne danku! Tuj post la pretigo de la unua numero rekon-

taktu min. Ni kunpropagandos plu favore al spiritismo.”

Ni rekontrolis la unuajn numerojn de la gazeto. En la kolofono ne troveblas nomo de ia redaktoro, sed nur de *kunlaborintoj* – inter kiuj Delanne ne aperas (kiel kunlaborinto li aperas en la dua numero). Sur la lasta paĝo, plej malsupre legeblas en la unua numero: *Le Propriétaire-Gérant* (Posedanto-Administranto). En laŭvicaj numeroj, plue fine de la gazeto, li aperas kiel *Le Gérant* (jaro 1, n-ro 4). En la numero 5, 1a jaro, paĝo 6 oni nomas lin *rédacteur-gérant du Spiritisme*, dum li aperas fine de la revuo kiel *Le Gérant*. Finfine, jen li aperas kiel *Rédacteur en chef* en la tria numero de la kvara jarokolekto de la revuo. La periodaĵo *Le spiritisme* lanĉiĝas jam kiel organo de “Union Spirite Française” (Franca Spiritisma Unuiĝo), kiun en decembro 1882 kunfondas Delanne mem kaj lia patro, s-ro Alexandre Delanne. Laŭ Bodier kaj Henri Regnault, sur paĝo 31, “la veraj animantoj” de la Unuiĝo kaj de *Le spiritisme* estis Alexandre kaj Gabriel.

Le Propriétaire-Gérant: Gabriel DELANNE.

Tours, imprimerie JULIOT, rue Royale, 53.

Le spiritisme, jaro 1, n-ro 1.

Pri Abel Gomes

Ĉiuj liaj konataj biografietoj asertas, ke li naskiĝis la 30an de decembro 1877 kaj forpasis, en la aĝo de 57 jaroj, la 16an de aŭgusto 1934. Nu, okaze de lia forpaso, naskiĝinte en 1877, li havus 56, ne 57 jarojn, kaj ĝuste tion ni asertis... erare, en nia artikolo pri la lanĉo de Kampanjo Abel Gomes, sur la paĝo 9. Ni ricevis ĉe la Paroko kaj Sanktejo “Nossa Senhora da Conceição”, en lia naskiĝurbo (iam Conceição do Turvo, nuntempe Senador Firmino) dokumenton atestantan la datojn de bapto kaj naskiĝo de Abel. En 1877 okazis ne la naskiĝo, sed la bapto, en la 7a de januaro. Li naskiĝis efektive en 1876, la 30an de decembro, kaj sekve forpasis en la aĝo de 57 jaroj.

Sur paĝo 9 ni asertis, ke Abel “vavis kune kun pli aĝa fratino”. Tiu ĉi informo legeblas en la nekrologo

publikigita en Reformador, numero de la 16a de septembro 1934 (referencita de ni en la artikolo). En lia libro “Braz Pires” (intertempe trovita de ni), eldonita de lia nevo Ismael Gomes Braga, en 1951, legeblas ke ĉe li vivis ankaŭ “nevino”, kies edzo estis al Abel *societa tajloro*. Tion rakontas Ismael mem, en la antaŭparolo de la libro. Supozeblas, ke ankaŭ la dirita edzo vivis kune. La biografieto de Abel Gomes el la libro *Personagens do espiritismo (Spiritistaj personecoj)*, eldonita de FEESP, en 1982, mencias krome, ke li estis adoptopatro de du “fraŭloj”. Ĉu ili loĝis kune kun Abel, ni ne scias. Ni referencis tiun fonton en nia artikolo, sed ellasis la informon pri la du fraŭloj. ■

Evangeliaj plukoj

NUR TIEL

“En tio, mia Patro estas glorata, ke vi donas multe da frukto; kaj vi estos miaj disĉiploj.” Jesuo (Johano, 15:8)

En niaj afliktoj, la Patro estas elvokata.

En jubiloj, adorata.

En tempesta nokto, ĉiam anksie esperata.

En festa tago, solene riverencata.

Laŭdata de l' dankoplenaj filoj kaj forgesata de la sendankaj, la Patro ĉiam donacas, disdonante la benojn de sia senlima boneco inter bonaj kaj malbonaj, justaj kaj maljustaj.

Li instruas vermon rampadi, arbuston kreskadi kaj homon rezonadi.

Neniu tamen pridubu la esperon de la Plejaltulo rilate al ni mem.

Dum niaj sinsekvaj ekzistadoj, li helpas nin kreskadi kaj servadi al li, por ke ni iam integriĝu, kiel venkintoj, al lia dia amo kaj povu lin glori.

Ni tamen neniam venos al tia pozicio nur por la milforma kolora brilo de niaj sentoj kaj rezonadoj.

Niaj noblaj idealoj estas nemalhaveblaj kaj esence similas la plej belajn kaj bonodorajn florojn de la arbo. Nepras sendube nia kulturo, kiu, esence, konstituas la fortikecon de la respektinda trunko. Niaj noblaj aspiroj estas altvaloraj, necesaj kaj reprezentas la vivajn kaj promesplenajn foliojn.

Ĉiuj ĉi kondiĉoj estas nepraj necesaj de rikolto.

Tiel same okazas en la kampo de la animo.

Nur eblas glori la Patron, kiam ni nin malfermas al liaj dekretoj de universala amo, agante por la eterna bono.

Ĝuste tial la Majstro klare esprimis sian aserton.

Nia agado dum la vivo produktu multe da frukto de paco kaj saĝo, amo kaj espero, fido kaj ĝojo, justeco kaj mizerikordo, per persona laborado digna kaj konstanta, ĉar nur tiel la Patro estos de ni glorata kaj ni estos disĉiploj de la krucumita kaj reviviĝinta Majstro. ■

Mesaĝo de la spirito Emmanuel, mediume verkita de Francisco Cândido Xavier. El la libro *Fonte viva*. Esperanta traduko plukita el Reformador, julio 2020.



KIAL MI SUFERAS?



La malbono kaj ties forigilo

14a SER

Spiritisma Esperanto-Renkontiĝo

La 14an de aprilo 2024

konsolanto.org/ser

Virtuala evento 